

ĈISM: la interlingvo de 2087

29a jarkolekto - aprilo 2008/04

Monato

INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

Monata revuo en Esperanto - Maandelijks - Antwerpen X - ISSN 0772-456 X

**Lastaj opinioj
pri la origino de vivo**

**Revivigo
de la manksa**

**Kosovo:
Fondita steleta ŝtato**



La plej nova novelaro de Lena Karpunina

Neokazinta amo

kun 15 novaj rakontoj, inter kiuj kelkaj estis premiitaj.



Legintoj skribas:

“Se mi estus leginta nur unu rakonton de Lena Karpunina, mi povus konvinke aserti: la juna verkistino estas vere talenta. En stilo klara, laŭ bona tradicio de la rusa literaturo, la rakontoj pliriĉigas niajn mensojn, plibonigas niajn korojn.”



(Ignat Florian Bociort)

“Ŝia majstra talento verkista konsistas ĉefe el homa psikologio kaj kapablo prezenti eĉ la plej strangajn personojn tiel, ke la leganto akceptas kaj eĉ ekŝatas ilin. En la Esperanta literaturo tiu ŝia talento estas vere malofta.”



(Sten Johansson)

Prezo: 15 eŭroj + afranko

Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo aŭ ĉe via kutima vendanto.

- ISBN: 90-77066-28-7
- Paĝoj: 150
- Serio Stafeto n-ro: 31

**Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.
Rete: www.retbutiko.net - retbutiko@fel.esperanto.be**

Fondita ŝtela ŝtato

Pasis jam pli ol ok jaroj, post kiam la internacia komunumo intervenis en la sanga konflikto en Kosovo. Ekde tiam administris la landon UNMIK, aŭspiciata de Unuiĝintaj Nacioj (UN). Pacon certigis milita strukturo KFOR, aŭspiciata de Nord-Atlantika Traktat-Organizaĵo (NATO). Antaŭvidite estis, ke post tri jaroj kosovanoj partoprenu referendumon por determini la estontecon de sia lando.



8

politiko

Kosovo	8
Fondita ŝtela ŝtato	
Dolĉa sendependiĝo	9
Sendependeco ne akceptebla	9

moderna vivo

Hungario	10
Polica mesaĝo	
Ukrainio	10
Valuto-debuto	
Homaj rilatoj	10
Varmo kaj malvarmo	
Duonislamano - duonferio	10
Alkoholaĵoj	11
Lakto-akto	

scienco

Evoluo	12
Lastaj opinioj pri la origino de vivo	

lingvo

Manksa	14
Brian Stowell - reviviganto de mortinta lingvo	

spirita vivo

Se konfuzi diversajn kreismojn	17
Rezolucio de eŭropa instanco pri evoluismo kaj kreismo	

hobio

Bibliofilio	19
Inter libroj posttagmeze	

libroj

Orient-azia itinero	21
Fabeloj tradiciaj kaj moderne verkitaj	22
Esperanto kiel helpilo por lerni fremdajn lingvojn	23
Nova Maigret-romano	24
Socipolitika satiro	25

novelo

ĈISM	26
-------------------	----

› Abonoj	4
› Enkonduko	5
› Leteroj.....	6
› El mia vidpunkto.....	7
› Anoncetoj.....	27

Lastaj opinioj pri la origino de la vivo

La rimarkindaj malkovroj de antaŭe nekonataj funkcioj de molekuloj de RNA, hipotezoj pri la rolo de malgrandaj molekuloj nur iomete antaŭenmovis la problemon de la origino de vivo sur la tero. Ekzistas ĉi tie ankoraŭ tro multe da demandoj, respondojn al kiuj devas doni la estonta scienco.



12

Brian Stowell - reviviganto de mortinta lingvo

En la mezo de la 20a jarcento restis nur kelkaj maljunaj denaskaj parolantoj de la manksa. La lasta mortis la 27an de decembro 1974. Tamen, intereso pri la lingvo jam vigliĝis inter sufiĉe multaj insulanoj. La plej valora kontribuado al la aktuala revivigo estis sendube farita de Brian Stowell, flua parolanto kaj entuziasmo.



14

ĈISM

2087: la triopo Ĉinio-Hindio-Brazilo superregas la planedon. La ĉina lingvo estas pene kaj suferas lernata de miliardoj da teranoj, tutsame kiel pli frue la angla-usona. La eminenta ĉina lingvisto Zhang Ruixiang publikigas – apogate kaj subtenate de la Ĉina Humanista Kompatema Estraro – la eseon Unua libro de ĈISM: Ĉina Internacia Senideograma Mandarena.



25

kiel pagi vian abonon de monato?

► Rekto al la eldonejo ...

- Per via FEL-konto.
- Per UEA-konto al la konto fela-x de Flandra Esperanto-Ligo.
- El Belgio al konto 000-0265338-43 de Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno.
- El Eŭrolando al IBAN-konto de Flandra Esperanto-Ligo, BE66 0000 2653 3843 (BIC-kodo BPOTBEB1), Postbank 1000 Brusel.
- El Usono per ordinara usona ĉeko.
- Per Visa (sed ne Visa Electron) aŭ Mastercard. Sendu la numeron, kontrolnumeron kaj validodaton fakse al +32 32 33 54 33, letere al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen aŭ rete al retbutiko@fel.esperanto.be.
- Per internacia poŝtmandato nome de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.
- Per internaciaj respondkuponoj. Unu kupono nur maldekstre stampita valoras 0,75 EUR.
- Per bankĉeko tratita je belga banko en eŭroj. Aldonu 12 eŭrojn pro la bankkostoj. Bv. noti, ke personaj ĉekoj ne plu estas akceptataj en Belgio.

► Tarifoj

Ŝtato de la paganto	MONATO			La JARO aere	
	surface	aere	rete	3a klaso	1a klaso
Argentino	EUR	23	27	13,8	5 9
Aŭstralio	AUD	82	90	49,2	9 17
Aŭstrio	EUR	49	53	27,6	5 9
Belgio	EUR	49	58	29,4	5 9
Brazilo	EUR	23	27	13,8	5 9
Britio	GBP	34	37	20,4	4 6,5
Bulgario	EUR	25	29	15	5 9
Ĉeĥio	EUR	33	37	19,8	5 9
Danio	DKK	365	395	219	40 70
Estonio	EUR	25	29	15	5 9
Finnlando	EUR	49	53	29,4	5 9
Francio	EUR	49	53	29,4	5 9
Germanio (ok.)	EUR	49	53	29,4	5 9
Germanio (or.)	EUR	45	49	27	5 9
Grekio	EUR	45	49	27	5 9
Hispanio	EUR	45	49	27	5 9
Honkongo	EUR	41	45	24,6	5 9
Hungario	EUR	25	29	15	5 9
Irlando	EUR	49	53	29,4	5 9
Islando	EUR	49	53	29,4	5 9
Israelo	EUR	41	45	24,6	5 9
Italio	EUR	49	53	29,4	5 9
Japanio	JPY	7900	8500	4740	860 1460
Kanado	CAD	73	78	43,8	9 15
Kipro	EUR	33	37	19,8	5 9
Koreio	EUR	41	45	24,6	5 9
Kostariko	EUR	23	27	13,8	5 9
Kroatio	EUR	25	29	15	5 9
Latvio	EUR	25	29	15	5 9
Litovio	EUR	25	29	15	5 9
Luksemburgo	EUR	49	53	29,4	5 9
Malto	EUR	33	37	19,8	5 9
Nederlando	EUR	49	53	29,4	5 9
Norvegio	NOK	390	430	234	45 71
Nov-Zelando	NZD	95	103	57	10 18
Pollando	PLZ	99	110	59,4	22 36
Portugalia	EUR	41	45	24,6	5 9
Rusio	EUR	23	27	13,8	5 9
Singapuro	EUR	41	45	24,6	5 9
Slovakio	EUR	25	29	15	5 9
Slovenio	EUR	33	37	19,8	5 9
Sud-Afriko	EUR	41	45	24,6	5 9
Svedio	SEK	460	495	276	49 84
Svislando	CHF	82	88	49,2	9 15
Tajvano	EUR	41	45	24,6	5 9
Usono	USD	69	75	41,4	8 13
Baza tarifo	EUR	49	53	29,4	5 9

► aŭ pere de peranto ...

- **Aŭstralio:** Libro servo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson Str. 2016 Redfern. Reto: libro servo@esperanto.org.au.
- **Aŭstria:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, 3400 Klosterneuburg. Pĉk. 7 127 744. Reto: leopold.patek@esperanto.at.
- **Belga:** Vlaamse Esperantobond, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43). Reto: financo@fel.esperanto.be.
- **Brazila:** Brazil Esperanto-Ligo, Caixa Postal 3625, 70084-970 Brasília. Reto: bel@esperanto.org.br.
- **Brita:** Viv O'Dunne, Esperanto-Asocio de Britio, Esperanto House, Station Road, Barlaston, STOKE-ON-TRENT, ST12 9DE, Britio. Reto: eab@esperanto-gb.org.
- **Ĉeĥa:** Pavel Polnický, Kunštátská 1350/III., 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651. La konto de ĈEA en Komerční banka: 3330 021/0100, variab. symbol por gazeto Monato: 07001. Reto: cea.polnický@quick.cz.
- **Dana:** Revusero de DEA, Arne Casper, Bryggervangen 70, 4. Tv., DK-2100 København Oe. Tel.: +45 39 20 63 48 Poŝtel.: +45 21 40 84 87. Reto: arne-casper@email.dk.
- **Estona:** Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-93812 Kuressaare. Reto: virveernits@hotmail.ee.
- **Finna:** Päivi Saarinen, Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki, Finnlando. Reto: eafoficejo@esperanto.fi.
- **Franca:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk.: 855-35 D Paris). Reto: esperanto-france@esperanto.org.
- **Germanaj:**
 - Literatura-Servo "Espero", Rolf Beau, Eißer Kirchweg 18, D-27333 Schwering (Volksbank Grafschaft Hoya eG, Konto-numero: 0 705 447 500, BGN: 256 635 84). Reto: RoBo.ESPERO@t-online.de.
 - Hans Dieter Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein (Postbank Ludwigshafen, pĉk 91856-676 (BLZ 54510067)). Reto: HDP@internacia-festivalo.de.
 - Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, D-55129 Mainz. Reto: wolfgang.schwanzer@tiscalinete.de.
- **Hispana:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat, 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions 2100-0461-90-0200055053). Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
- **Hungara:** AbonaSoft, HU-1093 Budapest, Bakatsi. 1/3III.1. Reto: abonasoft@gmail.com.
- **Irana:** Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184, Tehran.
- **Irlanda:** Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 12. Reto: noviresp@eircom.net.
- **Islanda:** Islanda Esperanto-Federacio, Pósthólf 1081, IS-101 Reykjavík. Reto: esperant@ismennt.is.
- **Itala:** Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, I-20143 Milano (pĉk.: 37312204). Reto: f.esp.it@infinito.it.
- **Japana:** Japana Esperanto-Instituto, Wasedamati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio 162. Reto: esperanto@jei.or.jp.

- **Kanada:** Kanada Esperanto-Asocio, P.O.Box 2159, Sydney, B.C., V8L 3S6. Reto: iwolemskatl@shaw.ca.
- **Kataluna:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions 2100-0461-90-0200055053). Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
- **Korea:** Seula Esperanto-Kulturcentro, 601 ho, Dongboog B/D 12-3, 2 ga Choongmu-ro Chung-ku Seulo, Koreio. 100-860 Rete: esperanto@saluton.net.
- **Kostarika:** Hugo Mora, Apartado 4981, 1000 San José. Reto: miamiau1@ice.co.cr.
- **Kroata:** Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Reto: mbelosev@public.srce.hr.
- **Latva:** Margarita Zelve, str. Rupniecibas 35-13, Riga, LV-1045, Latvio. Tel.: +371 6407174. Reto: Margarita@rsu.lv.
- **Litova:** Laimius Stražnickas, Laimius Stražnickas, LEA, a.k.187, LT-01003 Vilnius-C, Litovio. Reto: laimiuslt@gmail.com.
- **Luksemburga:** LEA, 1 rue de Kehlen, 8394 Olm (pĉk.: Luksemburgo 8936-12). Reto: esper_lu@geocities.com.
- **Nederlanda:** UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Reto: uea@inter.nl.net.
- **Norvega:** Eldonejo Esperanto A/S, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo 5. Reto: inform@esperanto.no.
- **Nov-Zelanda:** G. David Dewar, 24 Date Crescent, Christchurch 8025. Reto: gddewar@ihug.co.nz.
- **Pola:** Danuta Leyk, ul. Miedzyborska 117 m 8, PL-04-013 Warszawa, konto 06-1020-1156-0000-7102-0036-6328 ĉe PKO BP XIV O/Wwa. Reto: dankal@epf.pl.
- **Ruslandaj:**
 - Halina R. Gorecka, RUS-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1248, Ruslando. Reto: sezonoj@gazinter.net.
 - Mikaelo Ĉertilov, Pf. 21, RUS-143006 Odincovo 6, Ruslando. Tel.: 095-5934964. Banko: "AVTOBANK-NIKOIL", konto N.: 42301.810.3.0018.0084867. Reto: mikaelo@km.ru.
 - **Serba:** Zoran Ćirić, Branka Miljkovića 14, 18000 Niš, tel. +381-18-522 582, poŝtel. +381-63-7200 616. Reto: zeiric@eunet.yu.
 - **Sud-Afrika:** Colin Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge, 7441. Reto: cbeckford@telkomsa.net.
- **Svedaj:**
 - Esperanto-Skolan, Svenska Arbetar Esperanto-Förbundet, Svartviksvägen 14, S-123 52 Farsta, p.ĝ. 5 31 60 - 8. Reto: persson.esperanto@stockholm.mail.telia.com.
 - Sveda Esperanto-Federacio, c/o Lisbet Andreasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 35 Hörby, Svedio. Reto: bertil.andreasson@horby.mail.telia.com.
 - **Svisa:** Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 40-52 612-7 Basel. Reto: ch_scheidegger@bluewin.ch.
 - **Usona:** ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530. Tel.: +1 510 653 0998, Fakso: +1 510 653 1468. Reto: elna@esperanto-usa.org.

Eminenta amiko



Ekde numero 1/81 en nia revuo enketadis detektivo Jano Karál kaj – kompreneble – brile solvis la problemojn. La policano en fikcia lando okupiĝis pri ofte eksterordinaraj krimoj kun nekutimaj intrigoj. Kreis la figuron Johán Valano, kaŝnomo de Claude Piron. Kiam mi proponis al li verki krimnovelojn, li tuj entuziasme akceptis kaj tiel dum kompleta jarkolekto aperis streĉaj kaj krome amuzaj rakontoj de tiu eminenta aŭtoro. Estis plezuro legi la tekstojn de brila stilisto, kiu ĉiam klopodis pri „la bona lingvo”. Poste li daŭre subtenis nian magazinon, sed bedaŭrinde ne plu multe verkis por ĝi. Liaj preferoj kaj intereso fokusiĝis precipe pri la lingvo mem kaj aparte pri ties psikologiaj aspektoj. Unu el liaj ekkonoj estis, ke Esperanto estas miraklo kaj tial havas problemon, ĉar ne multaj homoj kredas je mirakloj.

Mi ne scias, kiom multaj el vi estas abonantoj de la unua horo kaj do memoras pri la tiamaj krimnoveloj. Sed certe tre multaj el vi memoras pri la sagaca analizo, kiun Claude Piron verkis okaze de la 25-jara jubileo de MONATO (*Funkcio kreas organon*,

MONATO 2004/4, p. 8). Li skribis pri la emocio, kiu kaptis lin, kiam li ekvidis la magazinon kaj – laŭ mi, iom troige – komparis tiun eventon kun la apero de Esperanto mem. Sed lia eseo, kiel kutime, estis tre sagaca kaj facile komprenebla. Lia precipa tezo estis, ke simple estas tempo por apero de tia magazino kaj ke ĝustatempe jen estis homoj por realigi ĝin. Kaj la lingvisto Piron ne forgesas emfazi la gravan rolon de nia revuo por la evoluo de Esperanto. Li finas sian eseon per danko al ĝiaj produktantoj: „Vi povas fieri.”

Nun Claude Piron mortis, 77-jara. Esperanto perdis korifeon, kiu estis brila stilisto kaj sagaca psikologo, krome eksterordinare talenta oratoro. Ni perdis eminentan amikon.

Sincere via

Stefan MAUL



www.monato.net

MONATO, internacia revuo sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo; monata revuo en la internacia lingvo Esperanto; fondinto: Stefan Maul; 29a jarkolekto; aperas principe la 1an de ĉiu monato, escepte de aŭgusto; abontarifo varias laŭlande.

100 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj; legantoj en 65 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaĵoj (ne tradukoj); represoj kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; kopi-rajto ĉe la eldonejo; ekzistas kaseda versio de MONATO por blinduloj, mendu ĝin pagante 12 EUR al UEA, konto robm-b; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.

Verantw. uitgever: Paul Peeraerts, Frankrijkplei 140, B-2000 Antwerpen.

eldonejo:

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijkplei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono: +32 3 234 34 00, telekopii: +32 3 233 54 33, retpoŝto: eldonejo@monato.net, Skype-telefono: fel-monato; valida anonc-tarifo: n-ro 9; kompostita, presita kaj vinkita en la eldonejo.

ĉefredaktoro:

Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg.

Rete: chefredaktoro@monato.net.

reviziantoj:

Hèctor Alòs i Font, Edmund Grimley Evans, Katalin Kováts, Jens S. Larsen, Brian Moon, Anna kaj Mati Pentus, Alexander Shlafer.

redakcia sekretario:

Paul Peeraerts. Rete: redakcio@monato.net.

grafiko:

Joan-Ferriol Masip i Bonet.

redaktoroj:

• **Arto:** Claude Nourmont-Moon, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim, Luksemburgo. Rete: arto@monato.net.

• **Ekonomio:** Roland Rotsaert, Visspaanstr. 97, B-8000 Brugge, Belgio. Rete: ekonomio@monato.net.

• **Enigmoj:** Jean Pierre VandenDaele, Hisselgasse 85, B-4700 Eupen, Belgio. Rete: enigmoj@monato.net.

• **Eseoj:** Sendu al la koncerna redakto-ro, depende de la temo.

• **Hobio:** Evgeni Georgiev, Auslandspre, Bankgasse 8, A-1010 Wien, Aŭstrio. Rete: hobio@monato.net.

• **Komputado:** Edmund Grimley Evans, 2 Comfrey Court, Cambridge, Britio CB1 9YJ. Rete: komputado@monato.net.

• **Leteroj:** MONATO, Frankrijkplei 140, 2000 Antwerpen, Belgio. Rete: leteroj@monato.net.

• **Libroj:** Boris Kolker, 2487 N Taylor Rd, Apartment 11, Cleveland Heights, OH 44118, Usono. Telefono/faksilo (216) 297-0370. Rete: libroj@monato.net.

Noto: Librocenzojn oni ne sendu al la redaktoro proprainiciate. La kunlaborantoj ricevos la librojn kaj la recenzopetojn de la eldonejo.

• **Lingvo:** Yamasaki Seikō, Higasi Kokubunsi, 185-0014 Tokio, Japanio. Rete: lingvo@monato.net.

• **Medio:** provizore sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijkplei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio. Rete: medio@monato.net.

• **Moderna vivo:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congle-

ton, Cheshire, Britio. Rete: moderna_vivo@monato.net.

• **Noveloj kaj Poezio:** Nicola Ruggiero, via Trento, 59 I-70042 Mola di Bari (BA). Rete: noveloj@monato.net.

• **Politiko:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: politiko@monato.net.

• **Scienso:** Thomas M. Eccardt, 455 E 14th St. #3C, New York, N.Y. 10009, Usono. Rete: scienso@monato.net.

• **Spirita vivo:** Gerrit Berveling, Kalverstraat 8 B, NL-8011 LH Zwolle, Nederlando. Rete: spirita_vivo@monato.net

• **Sporto:** Grigorij L. Arosev, a/a 5, RUS-127224 Moskva, Ruslando. Rete: sporto@monato.net.

• **Ŝerco kaj satiro:** Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg, Germanio. Rete: sherco_kaj_satiro@monato.net.

• **Turismo:** Evgeni Georgiev, Auslandspre, Bankgasse 8, A-1010 Wien, Aŭstrio. Rete: turismo@monato.net.

Jen ne pastra tasko

En sia artikolo *Surrealismo, surrealismo* (MONATO 2008/3, p. 10-11) Petro Desmet' skribas: „Ankaŭ la mallibereja pastro okupiĝas pri neniuj. Nur la trian tagon, post senĉesa petado, petegado, li montris sin du minutojn, kaj poste tute ne plu. Mi ĉeestis lian kristnaskan servon, kiu estis tre bona, sed nun mi kakos sur lin.”

Kial tia negativa reago? Laŭ mia ioma sperto pri tiaĵoj la pastro estas petata ankaŭ kaj precipe pri aferoj ne rilataj al sia tasko: religia – kaj sakramenta – servo al la petantoj. Certe, el tio povas konkretiĝi ankaŭ homa komforto por la enkarcerigito. Sed povas ankaŭ okazi, ke li aliriĝas al interesiĝo kaj partopreniĝo en la eventoj juraj kaj justicaj. Tiukaze li scias, ke tio ne estas lia tasko, kaj ĝenerale pri tio li estis avertita de severaj reglamentoj kaj leĝoj kaj spertoj, eble malagrablaj.

Eble Petro Desmet' seniluziigis pri la pastro pro kaŝita, kaj nekontentigita, homa espero ricevi plurflankan helpon, kiun li certe bezonis en tiuj tragikaj cirkonstancoj. Kompreneblas lia reago, kaj same kompreneblas la konduto de la pastro. Kiam senkulpeco evidentiĝos, klariĝos ankaŭ la animo de amiko suferanta, kiu nun sciis ke ni solidaras kun li.

Armando ZECCHIN
Italio

Etnaj hungaroj

Mian artikolon pri Beneš (MONATO 2007/12, p. 9) komentis Peter Bowing (MONATO 2008/02, p. 6). Li menciis erarajn donitaĵojn. En 1938 dum la intertraktadoj estis vokitaj ankaŭ Unuiĝinta Reĝlando kaj Francio en Munkenon. Tiu konferenco poste pludaŭris en Vieno, sed tie jam ne partoprenis britoj kaj francoj. Restis nur Germanio kaj Italio, do la mankantaj ŝtatoj faris naziema la packonferencon. Poste la demokratiaj landoj ne neis la Vianan Arbitracion. Ĝi deklaris, ke la teritorioj, kie la hungaroj loĝas en plimulto, apartenu al Hungario, kie la slovakoj loĝas en plimulto, apartenu al Slovakio. Laŭ la ĉeĥoslovakia statistiko en 1930 en la redonotaj teritorioj loĝis hungara plimulto de 57 %. Ankaŭ la hungaraj statistikoj en 1910 kaj en 1941 montras hungaran plimulton. Dum la loĝantarŝanĝo 73 000 libervolaj slovakoj forlasis Hungaron, dume 100 000 hungaroj *devige* venis en Hungaron, krome laŭ ordonoj amasoj iris al Sudetoj. La dekretoj pri la hungaroj finiĝis en 1948 laŭ ordono de

Stalin, sed la hungaroj restis sen havaĵoj. Dum la postmilitaj jaroj en la socialismaj landoj komence la Ruĝa Armeo, poste la komunistoj kolektis homojn por trudlaboroj ankaŭ en Sovetio. Tiutempe akuzoj pri militkrimoj ne estis demokrata metodo.

Karlo JUHÁSZ
Hungario

Publikaj rilatoj

Ŝajnus, ke la esperantaj UEA kaj Civito nun malapudas nur pro manko de oficisto pri publikaj rilatoj. Tio dedukt-eblas el *La pluŝurso kaj la profeto* (MONATO 2008/1, p. 7) de Paul Gubbins. Li skribas, ke racio kaj religio konfliktas kiel UEA kaj Civito. Sed li aldonas, ke por klarigi kaj amikige alproksimigi la „pluŝursan” supozitan ofendintinon de Mohamado kaj islamanojn, sufiĉus oficisto pri publikaj rilatoj, kiu bedaŭrinde tiam ne troviĝis. Se tiom facile solveblas la kontrasto, certe same tiom facile jes ja solveblas, ĉar certe troviĝas tia oficisto, la kontrasto inter racio kaj religio. Ĉu malfacilas akordiĝi kun li?

Armando ZECCHIN
Italio

Kiuj sendependiĝu? (2)

Pri Kosovo mi ne kompetentas komenti, sed mi miras, ke Sergio Jurjich (MONATO 2008/2, p. 6) ne rekonas, ke oni ne plu povas pravigi la ekziston de imperioj, se iam ili estis pravigendaj. Ĉiuj nacioj kaj etnoj – eĉ la malgrandaj, kiel Korsiko, Skotlando, Eŭskio, Kimrio, Flandrio ktp – rajtas esti sendependaj, se ili tion deziras. Se ili ne volas esti sendependaj, tio estas alia afero, sed pli fortaj ŝtatoj ne rajtas trudi al aliaj popoloj siajn lingvon, kulturon, ideologion aŭ religion aŭ postenigi sian armeon sur ilia teritorio. Kelkaj pluretnaj, plurlingvaj ŝtatoj ja sukcesis kunvivi en paco, sed ege malmultaj.

Garvan MAKAJ
Irlando

Kiuj sendependiĝu? (3)

Iam Stefan Maul verkis artikolon *Katastrofo en Irako*, nun li povas taji *Katastrofo en Eŭropo*, ĉu ne? Jen finfine eŭropanoj povas fieri kaj fajfi: ili ja atingis demo(n)kracion en Kosovo. Eŭropanoj kvazaŭ ŝafoj sekvis Usonon, kiu delonge agas laŭ la skemo „Dividu kaj regu”.

Jes, jam en 1999 NATO bombadis Serbion, de tiam NATO iĝis krimema organizaĵo, ĉar ĝi ja estis nur defenda

organizaĵo, ne agresa. NATO nenion ŝanĝis por tio en sia statuto; nur post la bombado de sendependa ŝtato la statuto estis ŝanĝita. De nun estas kreita precedenco. Gravas, ke la kosovanoj faris tion kontraŭleĝe kaj ĉi tion agnoskos Usono kaj iuj eŭropaj landoj. Do tuj post tio ĉi Sud-Osetio kaj Aĝario povos sendependiĝi de Kartvelio, Katalunio, Eŭskio kaj Galegio povos sendependiĝi de Hispanio, Nord-Irlando, Skotlando kaj Kimrio povos sendependiĝi de Britio, Bretonio, Korsiko kaj Akvitanio de Francio, Valonio kaj Flandrio povos foriri el Belgio ktp ktp. Eŭropa Unio povas disfali, kaj la eŭro-mono malaperos.

Kio okazos en Afriko? Ja eŭropanoj tie kreis kaj desegnis sur la mapo ĉiujn limojn! Kio okazos en aliaj partoj de la mondo? Eble baldaŭ Usono mem dispartiĝos je siaj 50 ŝtatoj, Dio helpu por tio! Ja iam Teksono provis apartiĝi, sed la demo(n)kratia Usono ne permesis.

Sergio JURJICH
Rusio

Kiuj sendependiĝu? (4)

Mi timas, ke Kosovo deŝiros lavangon de malkontenteco en diversaj landoj ... La pluaj malkontentaj malplimultoj en multaj ŝtatoj volos sekvi Kosovon ... Ĉu tio estos bona aŭ malbona, mi ne scias, eble tial mi timas ...

František HORÁČEK
Moravio

Kiuj sendependiĝu? (5)

La sendependeco estas ĉies rajto. Tamen, neniuj bezonus sendependecon, se ĉiuj havus rajtojn, almenaŭ egalajn rajtojn, eĉ pliajn. Neniu lando bezonu sekvi Kosovon, sed neniuj estu senrajta, eĉ precipe ne en sia hejmlando.

Gyurci BACHER
Hungario

Ĉu Flandrio kaj Valonio divorcu? (5)

La artikolon pri la probabla disiĝo de Belgio (MONATO 2007/11, p. 8-10), en kiu diversaj opinioj estas konigitaj, mi trovas tre bona. Sed reage al ĝi Roland Rotsaert rakontas (MONATO 2008/1, p. 6), ke li ne kredas pri la ĉiujara miliarda fluo de Flandrio al Valonio (kaj Bruselo?!). Kiel flandremulo mi sentis min tre indignigita. Tiel longe, kiel flandremulojn oni rajtas tiel krude trakti, la sangosuĉado de nia popolo ne estos forigita.

Omaar VAN HULLE
Flandrio

Krimaj riĉuloj

de Stefan MAUL

Julia Sander (nomo ŝanĝita) estas 40-jara. Antaŭ 12 jaroj ŝi edziniĝis al ĉarma viro kaj naskis du infanojn. Ŝia edzo komence laboris fervore; tiutempe en Germanio ankaŭ por homo sen profesio ne estis granda problemo trovi postenon. Sed tio ŝanĝiĝis kun la ĝenerala ekonomia regreso, kaj kelkajn jarojn poste li perdis sian laborlokon. Tamen, ĉar per sia antaŭa laborado li akiris sufiĉe da rajtoj, dum 5 jaroj li ricevis subvencion el la senlabor-asekuro. La familio povis kovri vivokostojn, precipe kiam Julia post la bebopaŭzo denove laboris partatempe. Sed intertempe draste ŝanĝiĝis ŝia edzo, konstatinte ke oni povas bone vivi ankaŭ ne laborante; per ĉiaj trukoj li sukcesis rifuzi ĉiujn postenojn proponitajn de la laboroficejo. Krome, por financi sian dolĉan neniofaradon, li prenis kreditojn kaj fine akumulis ŝuldojn de plurmil eŭroj.

„Parazitoj”

Julia, kiu diligente laboradis ekde sia 16a vivojaro kaj same diligente ŝparis monon, devis konstati, ke ŝia edzo estas mallaborema kaj finance neniel zorgadas pri la familio. Ŝi prenis sian ŝparitan monon por asecuri siajn du infanojn, tiel ke en okazo de bezono la asekuro povos financi lernadon de profesio aŭ studado. Intertempe pro tia misuzado, kian praktikis la edzo de Julia, oni draste reformis la socialasekurojn, por trafi la „parazitojn”. Ellaboris la planon direktanto Hartz [harc] de la aŭtomobil-firmao Volkswagen [fólksvagen]; laŭ li oni nomas ĝin „la Hartz-reformo”. Sekve la edzo de Julia ne plu ricevis ŝtatan subvencion, ĉar la koncerna instanco malkovris, ke la familio ja posedas ŝparitan monon (la porinfanajn asekurojn). Ĝi postulis, ke la familio foruzu tiun monon; nur poste ĝi povus denove ricevi subvencion.

Regreso

Dua scenaro: Karl Purke (nomo ŝanĝita) pensiigis en 1991. La ŝtata pensio (praktike la pinte ebla) sufiĉis nur por kovri la kurantan koston por loĝado, elektro, hejtado ktp. Sed, laŭ ĉiama konsilo registara, li ŝparis dumvive monon por pensia aĝo, du vivasekurojn. Tiun monon li uzis por privataj pensioj por si mem kaj sia edzino. Laŭ la kalkuloj la geedzoj povos teni proksimume sian ĝisnunan vivnivelon. Sed dum la postaj jaroj ne nur ne altiĝis la ŝtata pensio, sed male reduktiĝis, kaj krome ili devis elspezi pli kaj pli da mono por pli altaj kotizoj por san- kaj fleg-asekuroj. La privata pensio konsistas el du komponantoj: garanti-pago ĉiumonata kaj pago el la profito de la asekuro. Tiu parto de la privata pensio devus kreski, kiam prosperas la ekonomio. Sed, ho ve! Pro la ekonomia regreso dum tri sinsekvaj jaroj tiu pago malpliigis, tiel ke dum jam pli ol tri jaroj la geedzoj havas 300 eŭrojn malpli – mono, kiun ili bezonas por nutraĵoj dum ĉirkaŭ duona monato. Tamen, geedzoj Purke ne devas malsati, ĉar ili estas inter la bonstataj pensiuloj. Ke la situacio tamen ĉagrenas ilin, ĉar ili ne plu povas teni sian kutiman vivnivelon, tion oni ja povas kompreni.

Similajn sortojn kiel Julia Sander kaj Karl Purke havas milionoj da germanoj, el kiuj multaj vivas eĉ multe pli mizere. Ili perdis la fidon je ŝtato kaj registaro, kiuj dum jardekoj asertis ekzemple: „La (ŝtata) pensio estas sekura!” Ili spertis krome, ke ŝparado por eviti financajn riskojn estas punata de la ŝtato.

Fraŭdoj

Kaj nun okazis, ke oni malkovris unu post alia gigantajn financajn skandalojn en grandaj germanaj entreprenoj, nelaste ĉe Volkswagen. Kaj, kia paradokso, ĝuste direktisto Hartz

estis inter tiuj, kiuj fraŭdis el sia entrepreno. Li ricevis altan monpunon, sed tiun li povis pagi senprobleme, same kiel multaj aliaj, kiuj enkasigis milion-salajrojn. Neniu el tiuj direktistoj devas vivi mizere. Kulmine nun dungito el granda banko en Liĥtenŝtejno perfidis al germanaj instancoj, ke tie miloj da germanaj riĉuloj deponis siajn milionojn preter la impostoficejo. Temas pri pli ol 200 milionoj da eŭroj, kiujn ili devus pagi al la germana ŝtato. Grandan parton de ili nun atendas ne nur repago de imposto, sed ankaŭ grandaj punoj, ĝis karcerado.

Sed kion pensas pri ĉio ĉi ordinaraj civitanoj? Homoj kiel Sander kaj Purke sentas sin ekspluatataj de la ŝtato kaj kun kreskanta furiozo devas vidi, ke kapitalistoj ekspluatas la ŝtaton. La situacio en Germanio, kiu fieris pri sia „sociala merkatekonomio”, por multaj fariĝis horora. Ili demandas sin, kial milionuloj, kiuj ja vivas lukse, tamen krimas, fraŭdante la ŝtaton. Por kio ili uzas tiun ŝtelitan monon? Kie restas la solidareco tiom necesa en demokrata socio? Kaj ili demandas sin, kial oni ne punas ankaŭ malmoralajn ŝtatojn kiel Liĥtenŝtejnkon kaj Monakon, kiuj helpas germanajn krimulojn, je propra profito?

Perdita fido

Jes, estas eta konsolo, ke nun senskrupulaj impostfraŭduloj ne plu povas esti certaj, ke oni ne malkovros iliajn krimojn. Sed estis nur hazardo, ke iu homo en la „impostparadizo” ne plu eltenis tiun maljustaĵon kaj informis germanajn instancojn. Cetere, ne estas nura germana problemo: la informinto denuncis ankaŭ milionulojn en Usono, Italio, Francio, Aŭstralio kaj Britio. Eble la nuna skandalo almenaŭ efikos, ke oni sisteme malebligos impostkrimadon. Tiam eble iom post iom la ŝtatoj rekiros la perditan fidon de siaj ordinaraj civitanoj. ■

Fondita steleta ŝtato



Adem Jashari [jaŝari], kun 27 membroj de sia familio, sin oferis en 1998, militante kontraŭ serbaj tankoj. Legeblas Bac u kry! (Frato, plenumite!). Alivorte la idealo, por kiu li kaj miloj da aliaj martiroj oferis sian vivon, la libero, finfine realiĝis.

Dum tiu ĉi periodo la gvidantaro de Kosovo intertraktadis kun tiu de Serbio por determini la statuson de sia lando. Fine, kunlabore kun NATO kaj Eŭropa Unio (EU), kaj konforme al internacia juro, estis decidite fondi la novan ŝtaton sub signo kaj kontrolo de EU.

Minoritatoj

La nova standardo konsistas el blua fono kun orkolora mapo de Kosovo ĉirkaŭata de ses steletoj simbolantaj ses etnojn, el kiuj la albana estas la plej granda (pli ol 90 %). La nova konstitucio baziĝas sur demokratiaj principoj eŭropecaj, kiuj protektas unuavice la rajtojn de minoritatoj kaj homajn rajtojn ĝenerale.

La nova ŝtato estas rapide agnoskita de ĉirkaŭ 20 ŝtatoj tra la mondo. Ĝi aspiras aliĝi al ĉiuj internaciaj organizaĵoj, spite al kontraŭstaro de Serbio kaj ties aliancano Rusio. Ĝojigis la anonco de la Internacia Olimpika Komitato, ke estus akceptata teamo de Kosovo en la ĉi-jaraj Olimpiaj Ludoj en Pekino. La prezidanto de la komitato pravigis la decidon, dirante, ke lin interesas sporto, ne politiko.

Bardhyl SELIMI

La 17an de februaro la parlamento de Kosovo proklamis sendependecon disde Serbio. Fakte Kosovo estas apartigita de Serbio jam de junio 1999, kiam trupoj de Nord-Atlantika Traktat-Organizaĵo (NATO) devigis la armeon

kaj la policon de Serbio retiriĝi de la provinco, konforme al la interkonsento de Kumanovo, kiu reguligis la post-militan staton.

La regado estis kontrolata de Misio de Unuiĝintaj Nacioj en Kosovo (UNMIK).




SHKUMBIN SANEJA

Dolĉa sendependiĝo

Okaze de la sendependiĝo de Kosovo la dolĉaĵejo *Felini* en la ĉefurbo Prištino pretigis eksterordinaran kukon. Je dimensioj 5 m x 5 m, la kuko havis la formon de la mapo de Kosovo kaj pezis ĉ. 700 kg. Ĝi konsistis el ses ĉefaj partoj, kiuj reprezentis ses ĉefajn urbojn, ĉiu kun specifa enhavo kaj gusto.

Surkuke oni desegnis kolombojn kaj artfajrojn. Tranĉis la kukon la unua ĉefministro Hashim Thaçi [haŝim taĉi], kaj frandis ĝin en la ĉefplaco de Prištino ordinaraj civitanoj. Simile, kosova vinfarejo pretigis specialan sendependecan vinon *Pavarësia*.

Bardhyl SELIMI



MERKUR VALLBANI

Sendependeco ne akceptebla

La 15an de februaro, post definitiva raporto de elekto-komisiono, fariĝis por la venontaj kvin jaroj la nuna ŝtatestro Boris Tadić nova prezidento de la respubliko Serbio.

La tago gravas en la historio de Serbio. La 15a de februaro estas la Tago de la Ŝtato Serbio kaj la Tago de la Armeo de Serbio. Ĉi tiun tagon en 1804 ekribelis serboj kontraŭ turkaj okupantoj. La saman tagon en 1835 estis akceptita la unua serba konstitucio. Ĉi-jare la sama tago koincidas ne nur kun la prezidantiĝo

de Tadić, sed ankaŭ preskaŭ kun la sendependiĝo de Kosovo disde Serbio.

La novelektita prezidanto en la festparolado diris, ke nek li, nek Serbio akceptos Kosovon kiel novan ŝtaton sur serba teritorio. Tiel li frontos al diversaj problemoj, ne nur Kosovo, sed ankaŭ membreco en Eŭropa Unio, senlaboreco kaj krimeco.

Tadić venkis en la dua balota rondo per nur 2 % la kontraŭkandidaton el la Radikala Partio, Tomislav Nikolić.

Dimitrije JANIČIĆ



PEREGRINARI

HUNGARIO

Polica mesaĝo



MARTIN SHARMAN

Oftas trafik-akcidentoj en Hungario kaŭzitaj de alkoholo. La polico kontrolas la alkoholnivelon de ŝoforoj aparte dum la novjara perio-

do. Se ŝoforo konsumis alkoholaĵon, tiu ricevas severan punon.

La publiko aprobas la polican kontroladon. Nur la katolika eklezio protestas. Pastroj argumentas, ke estas devige trinki alkoholaĵon dum meso. Ofte pastroj mesas en tri vilaĝoj kaj ŝoforas inter la komunumoj. La polico tamen diras, ke ankaŭ mesovino estas alkoholaĵo. En Hungario konsumado de eĉ eta alkoholkvanto kaj sekva ŝoforado estas konsiderata punenda.

Notindas, ke malgraŭ senlaboreco en Hungario mankas katolikaj pastroj. Foje italaj aŭ poloj pastras anstataŭ hungaroj.

Karlo JUHÁSZ

UKRAINIO

Valuto-debuto

En Ukrainio, kiam aperis la nova valuto, oni komencis stampi ankaŭ jubileajn monerojn. Kelkaj – entute 15 – estas dediĉitaj al ukrainaj urboj. Ĉiuj havas kvin-hrivan valoron (proksimume unu usona dolaro). Tamen uzi la specialajn monerojn ne konsilindas, ĉar la valuta prezo ne egalas la veran.

La unua tia monero aperis en 1999 dediĉe al la 900-jariĝo de la urbo Novgorod-Severskij, en la regiono, kie naskiĝis la eksa prezidanto de Ukrainio L. D. Kuĉma. En 2005 aperis monero dediĉe al la 350-jariĝo de Sumi, la centro de la regiono, kie naskiĝis la nuna prezidanto de Ukrainio. Ekzistas ankaŭ moneroj dediĉitaj al Belgorod-Dnestrovskij, Jevpatorija, Balaklava (havantaj po 2500 jarojn), Korestenj (1300 jarojn), Poltava kaj Romni (po 1100 jarojn), Lvov (750 jarojn), Ĥarkov (350 jarojn), Kirovograd (250 jarojn) kaj aliaj.



MARY LOOSEMORE

La urbo Kerĉj estas la plej aĝa en Ukrainio. En 2000 ĝi festis sian 2600-jaran jubileon. Al tiu ĉi urbo estas dediĉitaj du jubileaj moneroj.

Dmitrij CIBULEVSKIJ

HOMAJ RILATOJ

Varmo kaj malvarmo

Antaŭ nelonge amaskomunikiloj en Albanio kaj Grekio raportis pri nekutima amo inter albanano 29-jara, nomata Fran, laborinta en Grekio, kaj riĉa grekino, vidvino 57-jara, nomata Rula Vrokopolu.

La paro, post nuptofesto, kunvivis feliĉe dum 18 monatoj, ĝis la junulo forlasis sian edzinon kaj revenis al Albanio. La grekino faris sian plejblon por revenigi sian amaton. Ŝi turnis sin al amaskomunikiloj kaj leterpetis la albanan prezidanton, esperante ricevi albanan pasporton, por ke ŝi aĉetu domon apud la vilaĝo de la foririnto.

La sinjorino publike petis, ke la junulo donu al ŝi infanon: poste ŝi ne plu ĝenus lin. Tamen ne reagis Fran. Aliaj junaj albanoj anoncis sian pretecon anstataŭ la malaperinton, sed Rula volis akcepti neniun alian ol Fran. Intertempe la filo de la sinjorino, hontante pro la konduto de la patrino, forlasis ŝin kaj decidis memstare vivi.

Laŭ la proverbo: „Sama buŝo blovas varmon kaj malvarmon”.

Bardhyl SELIMI

Duonislamano – duonferio

Mimoza estas albanino loĝanta en Örebro, Svedio. Ŝi estas islamano. Ŝia edzo, Leonard, estas svedo, kaj kristano. Ilia filo, naŭjaraĝa Emil, sentas sin duonislama kaj duonkristana. Kiam la knabo petis sian instruistinon lin tuttage liberigi la

20an de decembro, pro islama festo Kurban Bajram, tiu proponis kompromison: la knabo estas nur duonislama kaj do rajtas nur je duontaga ferio. Kaj tiel estis.

Bardhyl SELIMI

Lakto-akto

Komence de septembro proponas drinkejoj kaj bierejoj en Litovio anstataŭ alkoholaĵoj lakton aŭ laktokoktelojn. Cetere estas fermitaj alkoholaĵo-sekcioj en litovaj vendejoj. Jen la rezulto de ŝanĝoj en la leĝaro por protekti gejunulojn kontraŭ alkoholo-misuzo. Cetere, ekde 2008, estos malpermesite reklami alkoholaĵojn inter la 6a kaj 23a horoj en televido aŭ radio.

La ŝanĝoj rezultigis de premo flanke de ekleziaj instancoj kaj sociaj organizaĵoj, kiuj maltrankviligis pri troa konsumado de alkoholaĵoj, precipe inter junaj homoj. Kontraŭis la ŝanĝojn hotel- kaj restoraci-istoj, kaj ankaŭ kelkaj parlamentanoj, inkluzive de la parlamentestro, Viktoras Muntianas, kaj la ĉefministro, Gediminas Kirkilas.



„Stultaĵo” estas la leĝo, kiu malpermesas aĉeti alkoholaĵojn en Litovio.



La litova prezidanto, unue aprobis la ŝanĝojn, sed subite karakterizis ilin stultaĵoj.

Kulpo

La litova prezidanto, Valdas Adamkus, unue aprobis la ŝanĝojn, sed subite karakterizis ilin stultaĵoj. Li diris, ke li ne sciis, ke la leĝoj malpermesos komerci pri alkoholaĵoj. Adamkus akceptis sian kulpon rilate la lanĉon de la nova regularo.

Li diris: „Probable necesos vetoi la tutan leĝon. Fermi restoraciojn, kafejojn, rifuzi priservi eksterlandanojn nur pro tio, ke la 1an de septembro junularo ne trinku bieron kaj studentoj ne amuziĝu pro la komenco de la studjaro, pardonu, sed pli grandan stultaĵon ni ne povus elpensi.”

LAST



Kontribuojn por la rubriko *Moderna Vivo* de MONATO kunlaborantoj sendu al moderna_vivo@monato.net.

Lastaj opinioj pri la origino de vivo



La origino de vivo sur la tero ĝis nun estas malmulte komprenebla. Tial, antaŭe kaj nun, estas multe da adeptoj de „hipotezo de panspermio” (pri ebla enportado de primitivaj vivaj estaĵoj sur nian planedon el la kosmo) kaj eĉ de eterneco de vivo en la universo. Tamen, la lasta vidpunkto kontraŭdiras al la nuntempaj sciencaj informoj pri fizikaj kondiĉoj dum la komenca etapo de la ekzistado de la universo (superalta temperaturo ktp), kiuj tute ne taŭgis por aperigo de iuj vivaj estaĵoj. Krome, tre gravas, ke la ĥemia elemento karbono, sen kiu ne estas ebla kreado de vivaj substancoj, aperis nur tiam, kiam la aĝo de la universo atingis kelkcent milionojn da jaroj (nia tuta universo fondiĝis proksimume antaŭ 13 miliardoj da jaroj re-

zulte de Granda Eksplodo). Koncerne la „hipotezon de panspermio”, tutegale ĝi ne povas klarigi, en kiu maniero estis kreitaj el neviva substanco la unuaj primitivaj vivaj estaĵoj, antaŭ ol ili estis enportitaj al la tero. Ĝis nun, malgraŭ persista serĉado, nenie en la universo estas trovita vivo, krom sur la tero, kvankam, laŭ informo de iuj astrofizikistoj, nun nur en nia galaksio probable ekzistas ĉirkaŭ dek miliardoj da planedaj sistemoj. Verŝajne plejparte ili ne estas taŭgaj por kreado de vivo.


„Malvirta cirklo”

La teorioj pri la origino de vivo stumblis sur grava genetika problemo. La bazo de la gena kodo en ĉiuj vivaj

estaĵoj estas molekuloj de DNA (desoksiribonukleata acido) aŭ, ĉe iuj virusoj, molekuloj de RNA (ribonukleata acido). Sed por ilia reproduktado necesas fermentoj, kiuj precipe estas proteinoj. Tamen, por la sintezo de proteinoj el aminoacidoj necesas transdono de gena informo, kodita en molekuloj de DNA kaj RNA. Aperis la tiel nomata „malvirta cirklo”, el kiu en antikveco tradicie ne estis eliro!

Ebla eliro el la „malvirta cirklo”

Jam delonge estis konate, ke RNA plenumas en ĉeloj precipe la rolon de peranto en transdono de informo, kodita en DNA, al ribosomoj, kie produktiĝas proteinoj el aminoacidoj. Tamen antaŭ dudek jaroj du sciencistoj, Sidney Altman kaj Thomas Cech [ĉeh], nobelpremiitaj pri ĥemio en 1989, konstatis, ke iuj molekuloj de RNA estas kapablaj formi la tridimensiajn strukturojn kaj mem fariĝi la fontoj de gena informo. Plej gravas, ke tiuj molekuloj de RNA, diference de molekuloj de DNA, posedas memstaran fermentan aktivecon kaj povas reproduktiĝi sen helpo de aliaj fermentoj. Ili ricevis la nomon „ribozimoj”. Laŭ la opinio de iuj sciencistoj, tiuj aŭ similaj procedoj povis okazi dum komenciĝo de vivo, kiam RNA ludis la ĉefan rolon en kreado kaj evoluo de elementaj formoj de vivo. Lastatempe estis ricevitaj novaj faktoj pri la funkcio de molekuloj de RNA. Estis malkovrita la tiel nomata RNA-interfero, rezulte de kiu, helpe de duĉena RNA, povas okazi ĉeso de transdono de genaj informoj. La aŭtoroj de tiu eltrovo Andrew Fire kaj Craig Mello estis nobelpremiitaj



Ĉu la mem-kunmetiĝo de tiaj molekuloj estis la origino de la vivo surtera?

en 2006. Antaŭ nelonge estis malkovritaj molekuloj de RNA, kiuj estas kapablaj ŝalti kaj malŝalti la transdonon de genaj informoj en ĉeloj, tio estas ankaŭ plenumi la proteinan funkcion. Tiuj molekuloj de RNA estis nomitaj „ribokomutiloj”. La usonaj sciencistoj Jeffrey Barrick kaj Ronald Breaker (2007), kiuj esploras similajn molekulojn de RNA, nomis ilin la antikvaj genaj komutiloj, aŭ fragmen-toj de iam perdita mondo, direktita per molekuloj de RNA (*V mire nauki*, n-ro 6, 2007, p. 65-71) ...

Malgrandaj molekuloj

Iuj sciencistoj opinias, ke la apero de tiel malsimpla molekulo, kiel RNA, en komenca etapo de la apero de vivo, estas tre nekredebla proceso. Tiel, la usona sciencisto Robert Shapiro en la artikolo *Ĉe elfluejo de vivo* (*V mire nauki*, n-ro 10, 2007, p. 22-29) argumentas, ke la iniciatantoj de vivo pli probable estis iuj malgrandaj molekuloj. Sed, laŭ opinio de la aŭtoro, por ke la metabolo de la malgrandaj ĥemiaj molekuloj alkonduku al la apero de vivaj sistemoj, es-

tas necesaj difinitaj kondiĉoj: devas esti limo inter la loko de la reto de malgrandaj molekuloj kaj la ĉirkaŭanta medio, necesas konstanta alfluo de energio, kiu devas esti direktita al la subtenado de la plurŝtupa ĥemia proceso, kaj la alfluo de la substanco kaj energio devas superi la elfluon, t.e. la sistemo devas konstante reproduktiĝi. Tiuj kondiĉoj, laŭ R. Shapiro, povis realiĝi en multaj objektoj de la universo, kie la vivo povis naskiĝi kaj evolui surbaze de la malgrandaj molekuloj sen partopreno de RNA aŭ DNA. Tamen, necesas eksperimenta konfirmo de la realeco de tiuj procesoj. Almenaŭ sur la tero, la ĉefa rolo de la malgrandaj molekuloj en kreado de vivaj estaĵoj verŝajne povis efektiviĝi nur en la komenca etapo. Siatempe, en la procezo de evoluo, rezulte de natura selektado, aperis pli perfekta gena kodo, DNA, komence, verŝajne, surbaze de RNA. Tre gravas, ke nuntempe gena kodo estas simila en ĉiuj vivaj estaĵoj. Oni ne povas escepti en antikveco ankaŭ la transdonon de biologia informo per la proteina konformeco, kiel nun tio okazas inter prionoj.

Vivo sur la tero verŝajne aperis jam proksimtempe (certe, en geologiaj skaloj) post la formado de nia planedo. Foresto de la tera atmosfero en tiu tempo kontribuis al intensa alfluo de la suna energio. Estas eltrovitaj bluverdaj algoj, la aĝo de kiuj estas preskaŭ kvar miliardoj da jaroj. Kaj tiuj antikvaj vivaj estaĵoj jam havis ĉelan strukturon! Komence la tera atmosfero konsistis precipe el karbona dioksido, kaj natura selektado okazis en senoksigenaj kondiĉoj. Nur rezulte de la apero kaj evoluo de fotosintezaj organismoj komencis akumuliĝi oksigeno en la tera atmosfero.

Do, la rimarkindaj malkovroj de antaŭe nekonataj funkcioj de molekuloj de RNA, hipotezoj pri la rolo de malgrandaj molekuloj nur iomete antaŭenmovis la problemon de la origino de vivo sur la tero. Ekzistas ĉi tie ankoraŭ tro multe da demandoj, respondojn al kiuj devas doni la estonta scienco.

Vladimir LEMELEV



Brian Stowell – reviviganto de mortinta lingvo

Kredeble, ne multaj homoj havas la ŝancon en sia vivo persone konatiĝi kun iu, kiu preskaŭ sola sukcesis revivigi lingvon ĝenerale rigardatan kiel mortintan. Tamen, tiun sperton havis la aŭtoro de ĉi tiu kontribuaĵo. Ĉirkaŭ la jaro 1960 mi hazarde renkontis rimarkindan viron, kies nomo estas Brian Stowell

[brajan stoel]. Kune ni konversaciis, li en la manksa, mi en la skotgaela, kaj ni sufiĉe bone interkompreniĝis. Li afable donacis al mi kaj persone subskribis ekzempleron de manksa-angla vortareto. Tiu viro estas nun rekonata kiel unu el la plej influhavaj aktivuloj en la movado por revigligi la manksan, antikvan lingvon de la insulo Man, aŭtonoma reĝa

dependa teritorio en la maro inter Anglio kaj Irlando.

Brian Stowell naskiĝis en 1936 en Douglas [doglas], la ĉefurbo de Man. Kiam li estis studento, li iĝis flua parolanto de la manksa, perfektante sian posendon per oftaj konversacioj kun la multaj maljunuloj, kiuj ankoraŭ konis la lingvon, kaj per aŭskultado de konservi-



taj malnovaj registraĵoj faritaj de lingvistikaj esplorantoj. Li verkis librojn kaj diversajn skribaĵojn en la manksa. Ili inkludas tradukon de la angla infanromano *Alico en Mirlando* kaj originalan murdoromanon, *La vampirmurdoj*.

La manksa lingvo konsistigas unu el la tri variantoj de la gaela, t.e. la irlanda, la skotgaela kaj la idioma de Man. La

irlanda estas laŭkonstitucie la unua oficiala lingvo de la Irlanda Respubliko; la skotgaela estas la ankoraŭ vivanta lingvo de la nordo kaj okcidento de Skotlando. Lastatempe la nombro de indiĝenaj parolantoj de la du laste nomitaj ŝrumpis, sed ekde longe la manksa estis deklarita praktike mortinta, kvankam ĝi ankoraŭ estas simbole uzata, kune kun la angla,

en la *Tynwald* (manksa parlamento). Ĝis la 19a jarcento la manksa ankoraŭ estis parolata de la insulanoj, sed ekde tiam dominas la angla, kiel en preskaŭ ĉiu regiono de Britio kaj Irlando. En la jaro 1899 estis fondita *Yn Cheshaght Ghailckagh* (La Manksa Societo) por provi konservi la lingvon.

En la mezo de la 20a jarcento restis nur kelkaj maljunaj denaskaj parolantoj de la manksa. La lasta estis Ned Maddrell [madrel], kiu mortis la 27an de decembro 1974. Tamen, intereso pri la lingvo jam vigliĝis inter sufiĉe multaj insulanoj. Diktafonaj registraĵoj de la parolata lingvo estis faritaj de diversaj lingvistikaj esploristoj el Irlando kaj aliaj lokoj. La plej valora kontribuado al la aktuala revivigo estis sendube farita de Brian Stowell, flua parolanto kaj entuziasmo. Mal-



Dulingva bonven-mesaĝo sur la vojo al Doolish / Douglas, ĉefurbo de la insulo.

multa antikva manksa literaturo (kiu neniam estis abunda) estas konservita, do ĉi tiu moderna verkado estas eĉ pli mirinda kaj bonvena.

Ne plu ekzistas sur la insulo unulingvaj parolantoj de la manksa, sed jam aperas infanoj, kiuj konsistigas la unuajn mankslingvanojn denaskajn (t.e. samtempe manks- kaj angla-lingvajn) post multegaj jaroj. Ili, kompreneble, estas gefiloj de gepatroj, kiuj lernis la lingvon. La manksa registaro nun provizas intensan bazan klerigadon en la lingvo. En la domo de la antaŭa Lernejo de Sankta Johano nun situas *Bunscoill Ghaelgagh*, mankslingva elementa lernejo. En pluraj antaŭlernejoj estas uzata la manksa. Diplomoj pri la manksa estas donataj de la

Manksa Altlernejo, la Centropor Manksaj Studoj kaj la Universitato de Edinburgo (Skotlando). Dum la popolnombro de la jaro 2001, 1 689 insulanoj el totala loĝantaro de 76 315, aŭ 2,2 %, deklaris sin manksparolantoj. Manksaj personaj nomoj denove iĝas popularaj sur la insulo.

Kiel la aliaj du variantoj, la manksa apartenas al la gaela grupo de la keltlingva familio. Ĝi devenas de la antikva irlandaj kaj plej similas la dialektojn de orienta Ulstero (Nord-Irlando) kaj de Galloway (sud-okcidenta Skotlando). Malrapide parolate, ĝi estas pli-malpli komprenebla al irlandaj kaj skotaj gae-loj, sed la skribita manksa lingvo estas volapukaĵo por tiuj, kiuj ne aparte ler-

nis ĝian unikan ortografion. Bedaŭrinde, kiam la Biblio estis tradukita manksen, oni eldonis ĝin uzante bizaran literumadon similan al la nelogika kaj nekonsekvenca angla skribmaniero, sed kun iom da kimra influo. Estus multe pli praktike kaj facile adopti la irlandan (aŭ la sufiĉe similan skotgaelan) ortografion, sed tion oni ne faris.

Jen ekzemplo de la manksa skribmaniero:

Tán Gaelg feer ghoan cheumooie jeh Ellan Vannin, agh fod pobbble ennagh screeu ee ayns cheeryn elley. („La gaela estas tre malabunda ekster la insulo Man, sed kelkaj homoj en aliaj landoj kapablas skribi ĝin.”)

Pli „gaela” literumado aspektus tiel:

Tán Ghaelgfior-ghóinn teabha-muigh de Eilean Mhannain, ach faod pobal eanach scríobh íans t'oran eile.

Jen la irlandaj kaj skotgaela ekvivalentoj:

Irlanda: *Tá an Ghaeilge an-ghann (fí or-ghann) taobh amuigh de Oileán Mhanainn, ach fé adann daoine [pobal] é igini a scríobh i dtí ortha eile.*

Skotgaela: *Thaa' Gháidhlig glè-ghann (fí or-ghann) taobh amuigh de Eilean Mhanainn, ach faodaidh daoine [pobal] eigin ga sgrì obhadh ann an tì rean eile.*

La ilustraĵo montras Brian Stowell ricevantan de 6-jaraĝa nepo de la irlandaj aŭtoro Cathal Ó Sandair ŝildon honorantan la lanĉon de du libroj en la manksa lingvo. Temas pri manksa traduko de romano de Ó Sandair kaj la unua originala romano iam verkita en la manksa. Kaj la traduko, kaj la originala romano estas laboro de Brian Stowell. Okaze de la lanĉo la gazetaro komentis: „La manksa lingvo vivas kaj viglas!”

La manksa lingvo estas agnoskita de la Eŭropa Ĉarto pri Regionaj kaj Malplimultaj Lingvoj. Tamen, oni devas demandi sin, kiom longe eĉ pli fortaj lingvoj povos rezisti la premon de la angla. Homoj kiel Brian Stowell estas kuraĝaj batalantoj en la konstanta lukto por konservi la lingvan diversecon de la homaro.

Garvan MAKAI

Bibliografia postskribo:

Laŭŝajne ne ekzistas vortaroj aŭ lernolibroj en Esperanto pri la manksa, sed interesatoj, kiuj komprenas la anglan, povas konsulti jenajn verkojn: *Focklior Gaelg-Baarle – A Short School Dictionary of Manx Gaelic*, William Wood, eld. Alex. Maclaren & Sons, Glasgovo, Skotlando; „*Mona's Herald*” *English-Manx Pronouncing Dictionary*, J. J. Kneen, Douglas, la insulo Man. Vidu ankaŭ *Vikipedion* sub la kapvortoj „*Brian Stowell*” kaj „*Manx*”.

Rezolucio de eŭropa instanco pri evoluismo kaj kreismo

Ne estas facile tuj trovi aŭ krei la ĝustan vorton por esprimi novan koncepton: ke Dio kreis, estas komuna kredo en multaj kulturoj, sed ke Dio kree intervenis de tempo al tempo, kiam la evoluciaj fortoj, kiujn li programis, ne sukcesis salti al pli nova kompleksa vivformo, kaj ke tiun serion da intervenoj oni pretendas liveri kiel sciencan indukitan kaŭzon (konkure kaj kontraŭe al la novdarvinismaj teorioj) ... tio aspiras al nova vorto.


En oktobro 2007 estis aprobita de la parlamenta asembleo de la Konsilio de Eŭropo (do ne de la EU) la rezolucio n-ro 1580/2007, kiu traktas pri „la damaĝoj de kreismo en la edukado” en komparo kun la novdarvinismaj evoluci-teorioj. En la komenco de la rezolucio oni difinas *kreadon* kiel religian konvinkon kaj do tute distingeblan kaj separeblan de la scienco, kaj tio multe plaĉis al la diversreligia kredantaro, kiu jam delonge konfesas agordiĝeblecon inter kreado kaj speci-evolucio, jam plurfoje asertata de la kristanaj teologiistoj kaj eklezioj, aparte de la katolika oficiala instruado. Oni vidu, ekzemple, rezoluciojn de la papa akademio de sciencoj, kaj la deklaron de Johano Paŭlo la dua, laŭ kiu speci-evolucio estas „pli ol hipotezo”). Sed meze de la rezolucia teksto enŝteliĝis konfuzo.

Fakte la redaktistoj de la dokumento ŝajnas referenci al tiu speco de kreismo, kiu sin ligas al la laŭlitera interpreto de la biblia teksto certe apenaŭ plu menciita kiel neglektebla fatraso, aŭ al kreismo je usona stampo en la nova versio de la *Intelligent Design*¹, ĝuste kontraŭata de la sama dokumento, ĉar oni opinias ĝin



tro fora de ĉiu perspektivo je scienca karakterizo, kvankam ĝiaj subtenantoj, kristanaj kaj islamaj, ankaŭ tion preten-

das. La tezoj, fakte, de tiuj kreismemuloj ne povas posedi kriterion de scienceco aŭ esti eluzataj por nei la fenomenon



David Galadí-Enríquez
kaj Amrí Wandel

La kosmo kaj ni

Galaksioj, planedoj kaj vivo en la universo
(dua plivastigita eldono).

Vera manlibro pri teoria kaj praktika astronomio,
verkita de du profesiaj astronomoj.

224 paĝoj; ilustrita; bindita; 2005

Prezo ĉe FEL: 18 eŭroj + afranko
Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo
Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio

bŭtiko@fel.esperanto.be
www.retbutiko.net

aŭ ĉe via preferata libroservo

Premio Pirlot
2001

de la evolucia procezo, nek povus trovi lokon en la scienca instruado kiel alternativo al la teorio de la evolucio per natura selekto, kvankam eĉ tiu ĉi estas taksata nesufiĉa de kelkaj scienculoj nekreismemaj.

Tamen en la rezolucio de la Eŭropa Konsilio ne eblas klare kapti, al kiu ideo pri kreismo oni referencas. En la rezolucio oni fakte uzas sendistinge la esprimon *kreismo*, kiu havas konotacion religian-filozofian. La risko estas, ke ankaŭ la ideo de kreado estu forbarita el la moderna penso, kvankam ĝi en si mem ne interferas kun la scienca nocio, ĉar ĝi ja lokiĝas antaŭ kaj for de la sciencaj kategorioj, kiuj neniam, laŭ religiaj pensuloj, povas trovi kaj sperti fizikajn diajn spurojn. Vere, tio kion eventuale devintus kontraŭi la Konsilio de Eŭropo estus distordo de la koncepto de kreado, ĝia utiligado por scienca ekspliko de la evolucio de la vivantaro, same kiel faras certe la kreismaj tezoj, kiuj devenas de la usona *Intelligent Design*. Sed la manko de precizeco en la enhavoj de la uzata termino nek utilas al la bezonata klareco, nek favoras tiun distingon inter scienco kaj kredo, kiun ĝuste en la komenco de la rezolucio oni rekonas.

Ĉu tiu konfuzo enŝteliĝis ankaŭ pro manko de nova vorto por nova koncepto?

Sendepende de la demando, ĉu estas konvene aprobi aŭ malaprobi per politika dekreto, kio estas science ĝusta kaj science neĝusta, – ĉu vorta distingo ne utilis al la necesa distingo kiu, certamamente, mankis en tiu ĉi rezolucio?

En diskutado inter samideanoj, oni proponis la duopojn: unuakta kreismo kontraŭ plurakta kreismo, aŭ kreismo kontraŭ kreadismo, kreismo kontraŭ kreantismo, kreistoj kontraŭ kreadistoj ... Kion vi opinias?

Armando ZECCHIN

1. Laŭ kiu estas racie bezonataj kaj „science kaj spure konstatablaj” la laŭtempaj pluraktaj intervenoj de ia kaŝita plananta forto.

Inter libroj posttagmeze

Iom lace post promeno tra la granda vintra urbo mi eniris brokantejon por – malkaŝe dirite – ĉefe trovi seĝon aŭ almenaŭ ŝtupon de eskalo, sur kiu mi povus ripozi kelkajn minutojn kaj paŭzigi miajn dolorajn piedojn. En tiuspecaj vendejoj oni povas resti ne nerimar-kita. Tamen helpanto alproksimiĝis kaj proponis siajn servojn. Laŭ plurjardeka rutino mi demandis pri „libroj en Esperanto, vi scias, tiu artefarita lingvo”. Pro eblaj postaj diskutoj pri la prezo jam kelkfoje evidentiĝis saĝe iom ŝajnigi laikon kaj formuli la demandon laŭeble nefake. La kutimaj respondoj estas: „Ni nenion havas, bedaŭrinde” aŭ „Jes, ni foje havis, aktuale mi ne scias, sed bonvolu rigardi mem niajn vortarojn”.


Ĉi-foje estis la malpli ofta varianto: „Hm, jes ... ĉu ni ne havis kelkajn etajn broŝurojn?” kaj la kutima ekiro piedŝova en iun malantaŭan angulon ĉe iu malsupra breto, kiu certe necesigus kliniĝon. La vendisto mem kliniĝis – kaj mia doloranta dorso dankis lin sekrete. „Jen ĉio ...”, li bedaŭris kaj enmanigis al mi stake-ton da libroj. Supre la kutima Germana-Esperanto Vortaro de Hans Wingen, vortaro, kiun mi posedas de post mia unua kurso de antaŭ tridek jaroj. Hm ... „Ĉu mi povas ie sidiĝi por rigardi detale?” Jen, la kaŝita kaŭzo de mia vizito. „Sur tiun fotelon ...” li menton-umis angulen. Ekfalo en la seĝan molon, malstreĉigo, varmo, silento, agrablo. Kun la fortoj revenis la scivolo. „Wingen kaj kio ankoraŭ?” mi babilis al mi. „Dek du vesperoj en la Welt-verkehrs-sprache (malmoderna por monda komunika lingvo) Esperanto, Jung kaj Wingen 1932”, nu bone – „Ekzercaro de la lingvo internacia Esperanto, Kelter Varsovio 1900”, hej! Kompreneble mi proprietas la ekzercaron en multaj diversaj eldonoj, sed tiu estas eldono de Kelter!

Subite mi revigliĝas kaj estiĝas pli atentema. La kvara kaj lasta ero estis

kajereto kun malmola, bele marmorita kovrilo en mangranda formato kiel vortaro-kajereto. Neniu titolo surkovrile aŭ libro-dorse. Mi atente ekfoliumas la flaviĝintajn paĝojn: „Wörterbuch der internationalen Esperanto-Sprache. International deutscher Theil, Meza Vortaro internacia-germana – Warschau L. Samenhof, Str. Przejazd N. 9. – 1889.”

Fulmbate ĉiu laco estas for, miaj manoj malsekiĝas. Ĉu originalo de nia Esperanto-libro n-ro 21 de 1889!? Ĉu represo? Kiu represo do, mi ne aŭdis pri io tia? Kompreneble ekzistas represo en la kolekto de bedaŭrata Ludovikito, sed ne kiel aparta broŝureto. Do ĉu tamen originalo?

*Titolpaĝo de la Zamenhof-vortaro de 1889.
Represo de la Esperanto-verko n-ro 21
(kun stampo de la Biblioteko Hodler)
oni trovas en ludovikito [t.e. Itô Kanzi].*



kiel wie.	knab Knabe.
kie wessen.	knien kneten.
ist Kiel (eines Schiffes).	knies Knies.
kie was.	knob Knob.
kie wie viel.	knob Knob.
kie Kärass.	knob Knob.
kie küssen.	knob Knob.
kie Kittel.	knob Knob.
kie wer, welcher.	knob Knob.
kie Faden, Kladter.	knob Knob.
kie Klappe.	knob Knob.
kie klar.	knob Knob.
kie Clarinette.	knob Knob.
kie Classe.	knob Knob.
kie Klavertaste.	knob Knob.
kie gebildet.	knob Knob.
kie Kima.	knob Knob.
kie nagen.	knob Knob.
kie Klystier.	knob Knob.
kie sich Mühe ge-	knob Knob.
ben, besorgt, ge-	knob Knob.
schäftig sein.	knob Knob.
kie Kappe, Glocke	knob Knob.
(z. B. über einer	knob Knob.
Uhr).	knob Knob.
kie Club.	knob Knob.
kie Schiene.	knob Knob.

„Trankvile, oldulo, trankvile, rigardu de proksime.” Kaj jen: jes ja, estas ĝi. Diabla, damna numero 21. Pura ekzemplero kompleta, sen ekslibriso aŭ stampo aŭ dediĉo, nur kun tre klara nomindiko en malnova manskribo per nigra inko: „Hans Deutsch”. Broŝurfine en sama manskribo „Aldono” kun kelkaj



Aŭtografo de la iama posedanto
Hans Deutsch.

Esperantaj vortoj en latinaj literoj kaj la germanaj tradukoj en stenografia skribo. „Tiel do ĝi sentiĝas, la revo de ĉiu libro-kolektanto”, mi tremis, kiam ekstere de nove ekneĝas. Lante forsinkas la mondo transe de la duonhelo de mia brokanteja fotelo. „Ĉu Zamenhof mem siatempe sendis tiun vortaron al iu interesata kliento?” – „Prenis ĝin de la stoko, metis en kovrilon, portis al poŝtejo?” – „Kiel monaĥo je ‘La Nomo de la Rozo’, kiu malkovris la libron pri la povo de rideto”, mi ekkontentis. „Tion neniu kredas al vi; ‘Hans Deutsch’, ha, fanfaronulo sen fantazio, oni diros”, miaj pensoj pluvagas. Ĉu vero, tiu muta neĝo-obskuro, tiu duonhela tago inter revo kaj realo aŭ ĉu tamen ...?

„Ĉu vi prenos ilin? Ni fermas”. Hezite mia atento revenas al la nuno. „Eh, ja,

sinjoro ..., mi ne scias, kiom ili kostas?” Mi ekstaras kaj sekvas lin al bela antikva kaso. Kun kvazaŭ aŭtomata gesto li malfermas la lastajn paĝojn, duonvoĉe kaj nekompreneble legas la tie notitajn prezojn kaj enkape adicias. „Ĉu pageblas?” mi subite silente ektimas. Tra duonfermitaj lipoj li diras sumon. Surprizite kaj konsternite mi rigardas lin rekte en la okulojn. „Nu bone, se vi prenas ĉiujn kvar, ni ankoraŭ iom reduktos, kaj mi proponos rondan sumeton XY”...

Do okazis, ke mi pagis 20 eŭrojn por la *Meza Vortaro internacia-germana* de Zamenhof de 1889 kaj 8 eŭrojn por la *Kelter-ekzercaro* de 1900. Ĉu vi kredas aŭ ne, la vortaro apartenis pli frue al „Hans Deutsch”, kaj dum iu malvarma griza berlina vintra tago mi spertis la ĉielon de librokolektanto, kiel neniam antaŭe en mia tridekjara „manio je malnova papero”. La Wingen-vortaron mi intertempe fordonacis ...

Bernhard PABST

PS: Se iu povus ion indiki pri Hans Deutsch, bonvolu skribi al: Bernhard.Pabst@gmx.de

Sen Rodin

Bildoj pri Norda Lando kaj aliaj rakontoj

Juna Sudlandano vizitas landon de Nordanoj ... enamiĝas en ĝi, kaj en Nordlandano. Kiel noktopapilio li ne povas rezisti kaj tuj reiras por kaptiĝi en lanternan fajron, senbadaŭre kaj konscie.

Ĉiu ĉapitro estas aparta originala noveleto pri iu aŭ alia norda gemo. La novelaron sekvas alia novelaro de aliaj apartaj kaj tre allogaj miniaturoj.

Donald Broadribb pri ĝi komentis: „Ĉi tiu kolekto de 51 rakontoj rangas inter la plej majstraj verkoj de la aktuala esperanta literaturo. certe ĝi rangas apud la noveloj de Trevor Steele; kaj el la ĉefaj novelmajstroj de nia pasinteco, apud tiuj de Stellan Engholm kaj Ferenc Szilagy.”

ISBN: 90 77066 22 5
Pezo: 320 g
Prezo ĉe FEL: 24,00 €
+ aŭfranko.

Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio;
www.retbutiko.net, retbutiko@retbutiko.net, aŭ ĉe via kutima librejo.

Orient-azia itinero

Jam en MONATO de junio 2005 mi havis okazon recenzi du poemarojn de Jorge Camacho Cordón, *Celakantoj* kaj *Saturno*. Tie mi laŭdis la versteknikon kaj montris pli modestan entuziasmon koncerne la enhavon. La eseoj, kiuj ornamis tiujn du verkojn (de Nervi kaj Neves respektive), ŝajnis al mi tro altetaksaj: evidente, poeto tiel persona kiel Camacho vibrigas diversfrekvenca animojn (kaj la juĝojn) de la legantoj.

Laŭ la kutimo de la eldonejo, ankaŭ en la nuna libreto eseeto aperas postparole. Prave, ĉar ĝi ja ne prezentas la poemaron aŭ la aŭtoron al legonto, sed parolas pri ili al jam leginto, kiu do povas aŭskulti kaj konsenti aŭ mal-, scianta pri kio temas. Baldur Ragnarsson historie, estetike kaj eĉ anekdote esploras pri la japanaj poemformoj, la hajko kaj la tankao, kiuj iel kaptis Camachon dum lia vojaĝo en Japanio kaj Tajvano kaj fariĝis ŝatata formo en ĉi tiu poemaro. Kaj li esploras, kiel Camacho tiujn versformojn mastrumas. La libreto entenas sepdekda poemoj, verkitaĵoj (krom unu forgesita en la antaŭaj kolektoj) inter 2005 kaj 2006 plejparte dum la restado en tiuj landoj; granda plimulto de la poemoj havas kvazaŭ piednotan tradukon en la hispana, kelkajn pli longajn plena versio hispanlingva simple sekvas aŭ, sporade, antaŭas, tiel ke ne nepras distingo pri tio, kiu estas originalo kaj kiu traduko. Ne ĉio estas ĝis nun nepublikita: *Fonto* estis jam estrado, sur kiu Camacho prezentigis plurfoje per kelkaj el la nun kunigitaj poeziaĵoj.

Maleblus akompani la poeton sen liaj postmetitaj notoj, al kiuj la leganto tuj iru ĉe okaza nekomprene pri vorto rara aŭ nomo nekonata. La notoj, krom doni interesajn instruojn pri orientaziaĵoj nekutimaj por eŭropanoj, rakontas ankaŭ pri tio, kiel la poeziaĵo naskiĝis aŭ evoluis: jen estas menciitaj poetrofratoj, kiuj sugestis pli taŭgan version, jen estas ekzegezo de vortoformo

ŝanĝita en diversaj vortaraj eldonoj, jen estas danko al alia klerulo, kiu helpis per sia scio. Camacho honeste redonas ĉiam al Cezaro la proprajn de Cezaro. Sed ĉi preskaŭ pedanta klarigo supozigas, ke ne la rezultinta poemo ĉefe interesas la aŭtoron, sed ja ĝia knediĝo kaj elkresko. Tio vidiĝas ankaŭ en la skrupula notado de la verkodatoj kaj verkolokoj: du plenaj paĝoj estas dediĉitaj al listigo de tiuj detaloj. Dek sep lokoj! Unu el la versaĵoj, donanta la titolon al la poemaro, la aŭtoro verkis, evidente, dum transkontinenta flugo, ĉar li hezitas loki ĝin ĉu en Tajvano, en Mulhaŭzo aŭ en Madrido ...

Camacho ĉizas malmultvorte; li iras sian vojon, pesimisme. Kvardekjarulo, la revoj de la junaĝo estas jam for:

*Notu bone, junuloj: vi ne estas la futuro.
Elaston, energion kaj miraĝojn jun-aĝajn
mi konas, spertis aŭ, almenaŭ, memoras,
sed la sola futuro nomiĝas maljun'.
Ne trompu vin, junuloj: la paseo vi estas.
Via futuro? Jen mi!*


Kaj tute pesimisme li rigardas al la grandaj konfliktoj de nia epoko: ekde la hiroŝima katastrofo ĝis Irako, Libano, Palestino (al ĉi lasta turmentata lando li havis tra aliaj verkoj speciale ameman atenton). Prave Ragnarsson indikas la (longan) poemon „Datrevene”, verkita en Hiroŝimo, kiel la centron de la poezia sperto de Camacho en ĉi tiu jarduo: la homa raso evoluis „de ŝtonhakilo al atomnukle” tra la diversaj sciencaj eltrovoj, ĉiuj direktitaj al mortigo. Se licas komparo inter poeziaĵo kaj plena epopeo, kelkaj versoj reeĥas la etoson de *La infana raso*. Camacho laŭte protestas kontraŭ la militaj kaj diktatoraj fiaĵoj: ĉu sterila kaj neaŭskultata protesto, kiel ofte denuncoj de poetoj, aŭ male lia engaĝita indigno havas socian rolon kaj efikon konkretan? La leganto juĝos. Same pesimisma estas la koncepto pri vivdisvolviĝo kaj vivkonkludo (ĉi-loke aŭdiĝas reeĥo el Kalocsay):

*La tutan vivon
labori ŝpare, ŝvite,
preter ripozo,
ĝis inkognite kora
atak', aŭ metastazo.*

Aliloke kaj alimomente, retrospektive pensante pri faligita domo de la infanaĝo, tra citaĵo el Espinosa, Camacho sugestas al ni pensigan bildon:

*historio reale komenciĝas
de sia fino.*

*Alivorte, nur la dua ronda krampo
permesas distingi la subtilan kurbecon de l'unua.*



La momentaj bildoj estas la atuto de la poeto en ĉi tiu kolekto. Momen-
toj kaj pensoj, kiujn certe multaj jam
spertis, sed ne priversis. Tamen ne
decus postuli de ĉiu mikropoeziaĵo
ion sensacian; imagoj, splitoj,
apenaŭaj flagroj, abruptaj ekbriloj tuj
estingiĝantaj; grandaj principoj, en-
fermitaj en malmultsilabajn strofojn.
Multo pensigas, sed, se paroli tute
libere kaj sincere, kelkio forgesigas
jam ĉe paĝoturno. Camacho publik-
igas ĉion de si; aliaj verkistoj estas pli
kritikaj al si mem kaj eldonas libro-
forme kvazaŭ antologion de siaj
skribitaj linioj. Tamen, ne malbone:
la poeto elmetas sin komplete kaj sen
reteniĝemo al la juĝo de la legantoj;
tuŝas siajn personajn kordojn kaj el-
metas siajn sonojn. Ĉu ili trovas re-
sonancon en aliuloj, tio lin ne tuŝas,
kaj ĝuste tiel Camacho interpretas la
esencon de sia poeteco.

Carlo MINNAJA

Jorge Camacho: *Eklipsas*. Eld. Bero, Rotter-
dam, 2007. 116 paĝoj broŝuritaĵ.

Prezo ĉe FEL: 10 eŭroj + afranko.

**La libroj kaj diskoj
recenzitaj en MONATO
estas mendeblaj de la
Retbutiko de FEL,
Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen,
Belgio.**

**Tlf. + 32 3 234 34 00;
tlk. + 32 3 233 54 33; rete:
retbutiko@retbutiko.net;
skajpe fel-monato aŭ per
www.retbutiko.net.**



Fabeloj tradiciaj kaj moderne verkitaj

Malabundas fabelkolektoj en Es-
peranto. Por junaj infanoj la re-
zulto estas, ke tre granda parto
de la monda folkloro devas esti perata en
la etnaj lingvoj.

Tra la tuta Eŭropo, kaj el tie tra la
Amerikoj, Oceanio kaj aziaj landoj,
disvastiĝis, en nekalkulebla nombro da
variantoj, kelkaj fabeloj, kiuj per tio
fariĝis parto de la folklorstoko de miliar-
doj da infanoj. Kurioze, laŭ unua vido,
estas, ke neniuj definitiva tekstoj de la fa-
beloj ekzistas. Kial? Ĉar longe, antaŭ ol
esti skribitaj, ili cirkuladis parole kaj tiel
akiris multajn formojn.

Infanoj ĝuas aŭdi (kaj poste legi)
multegfoje la samajn rakontojn. Kiu
patr(in)o sukcesis eskapi la ĉiuvesperan
postulon „Rakontu/legu al mi pri ...”?

En ĉi tiu tre modestaspekta libro ni
trovas variantojn de kvin tradiciaj fabe-
loj, plus du modernajn verkojn fabel-
karakterajn:

1. La Montfort-a anasino. Bela jun-
ulino estas kaptita de grafo kaj dorlotata,
kvankam mallibera, en luksa ĉambro. Ŝi
votas pilgrimi ĉiujare al preĝejo de certa
sanktulo, se li ebligos al ŝi eskapon. Ŝi
liberiĝas. Post sia morto, en formo de
anasino kun idoj, ŝi plu plenumas tiun
voton.

2. La blua virbovo. Varianto de la
fabelo pri Cindrulino. Servistigitino, per
helpo de la spirito de morta blua virbovo,
trifoje, elegante vestite, ĉeestas meson,
kiun ĉeestas ankaŭ princo. La lastan fojon
ŝi perdas lignan ŝuon, kaj la princo ĝin
trovas. Trovinte, ke nur ŝia piedo povas
facile eniri ĝin, la princo ŝin edzinas.

3. La reĝeto Johano. La plej juna el
tri filoj de reĝo kompatas malriĉan mort-
inton kaj porpagas lian entombigon. La
vulpoforma spirito de la mortinto helpas
la junulon akiri turdon, kiu reunigas,
kaj belulinon kun ora hararo. Gajninte
ilin, la junulo heredas la reĝan kronon.

4. La sorĉisto Merlino kaj la kava-
liroj de la Ronda Tablo. Varianto de la
fama legendo pri Reĝo Arturo kaj la
sorĉisto Merlino.

5. La faboplanto. Magia faboplan-
to ebligas al malriĉa viro grimpi ĝis la
ĉielo. Tie li petas kaj ricevas, de Sankta
Petro, azenon, kiu fekas monerojn. Sed
gastejestro ŝtelas la azenon. Duafoje la
malriĉulo petas Sanktan Petron kaj rice-
vas buŝtukon, kiu provizas manĝaĵojn.
Denove la gastejestro ŝtelas. Triafoje la
malriĉulo petas Sanktan Petron kaj rice-
vas bastonon, kiu bategas, kiam ordon-
ite. Ĝi bategas la gastejestron, kiu devas
redoni la ŝtelaĵojn.

6. Arzoustaff. Tre ĉarma moderna
rakonto, verkita de André Ronceray en
1993. Soifanta knabino renkontas ranon
en fonto. Post diskutado la rano petas
al Thalamis, la reĝino de la orkideoj, ke
ŝi refeliĉigu la landon. Thalamis sendas
mesaĝon, kiu atingas ĉiujn akvojn, plan-
tojn kaj bestojn de la reĝlando Galezio. Ŝi
ordonas, ke ili muzikadu por festo en cer-
ta vilaĝo. Flugkapabla porko portas iliajn
reprezentantojn al la festo. Nun ĉiujare ili
muzikas en la festo kaj ĝojigas la landon.

7. La vera historio de la lupoj en la
„Lupa Ĉambro”. Moderna rakonto,
verkita de Josette Ducloyer en 2005.
Tre mallonga rakonto pri la lasta vivanta
lupo.

Pluraj komposteraroj ĝenas legadon
de la libro, sed ne sufiĉe, por senkuraĝigi
la leganton. La stilo de la rakontoj es-
tas plaĉa, la enhavo estas klara. Entute,
bona kolekto havinda por tiu, kiu amas
fabelojn kaj/aŭ devas kontentigi siajn in-
fanojn per fabeloj.

Donald BROADRIBB

Jean-Pierre Ducloyer: *Bretonaj fabeloj. 1 – En
Broceljando*. Eld. FEB, Rennes (Francio), 2007.
77 paĝoj vinktitaj. ISBN 2-9520978-3-6.

Prezo ĉe FEL: 7,79 eŭroj + afranko.

Esperanto kiel helpilo por lerni fremdajn lingvojn

Tiu ĉi grandformata, bela libro ŝajnas nekutime utiligebla pro kelkaj trajtoj.

1. Ĝi estas modelo de libroeldonado en lingvoj nacia kaj Esperanto – ĉiu paĝo estas dividita je du partoj, paralele prezentantaj Esperanto-tekston kaj la nacilingvan originalon.

2. En la enkonduko ni legas: „Por ruslingva leganto ni decidis celkonforma en la komenco de la libro disponigi du paĝojn al la prezento de kurta Esperanto-lernolibro. Ni opinias, ke konatiĝo kun ĝi dum unu-du horoj antaŭ ol legi la libron ebligas al personoj, kiuj ne posedas Esperanton, analizante en komparo la originalan tekston kun Esperantoversio, ĉe la fino de la legado ekposedi elementan Esperanton.” Sekve la libro estas siaspeca Esperanto-lernilo kaj Esperanto-varbilo.

3. La libro enhavas la plej freŝbakitajn opiniojn laŭtemajn de 34 mondkonataj kaj elstaraj rusiaj kaj internaciaj personoj, inter kiuj 29 estas sciencistoj (plej ofte sciencistoj-esperantistoj).

4. Fakte, la libro estas metodologia helpilo por oficialigo de Esperanto en diversaj landoj, ĉar ĝi enhavas dokumentojn kaj priskribojn de laŭetapaj agoj al la oficialigo de Esperanto (enkonduko en ŝtatajn studplanojn).

5. Eble la plej valora kvalito de la libro kaŝiĝas en ĝia strukturo. Post prezento de la konferenca programo sekvas listo de la partoprenontoj, inkluzive la amaskomunikilojn, kaj la informomaterialoj – mallongaj enhavoj de letero de REU (Rusia Esperantista Unio) al la Rusia Ministrejo pri Klerigo kaj Scienco kaj Deklaro de Jurscienca Universitato *Justo* al la ministro, plena rifuzo de opinio (Moskva Ŝtata Lingvistika Uni-

versitato), letero de la rektoro de *Justo* al la Scienc-Esplora Konsilio (SEK) ĉe Rusia Supera Tribunalo kun propono okazigi internacian ekspertizon kaj konfirmi konsiston de la eksperta komisiono, respondo de SEK kun la konsisto de la komisiono.

Du gravaĵoj de la antaŭkonferenca preparo estas du konkludoj: de Internacia Eksperta Komisiono kaj de katedro pri internaciaj lingvoj en Universitato *Justo*. La sekvaj 12 paĝoj estas dokumentoj korespondaj inter *Justo* kaj Ministrejo pri Klerigo kaj Scienco, la moskva registaro, Rusia Ŝtata Dumao (parlamento). La sekvantaj ses paĝojn antaŭ la paroltekstoj kaj tezoj de la konferenco-partoprenintoj okupas dokumentoj, kiuj plene subtenas pozicion de la internacia eksperta konkludo pri bezono enkonduki Esperanton en studplanojn de mez- kaj super-lernejoj; tio estas leteroj de Instituto pri Lingvoscienco ĉe Rusia Akademio de Sciencoj, Federacio pri Paco kaj Konkordo, la filologia fakultato de Rusia Ŝtata Universitato de Popolamikeco.

Plue ni vidas kolorajn fotojn de 25 konferencaj parolintoj kaj aŭtoroj de tezoj kaj iliajn tekstojn kun emfazo de plej interesaj fragmentoj. Ilin sekvas diverslandaj resonoj kaj artikolo, aperinta en la rusia registara ĵurnalo *Rossijskaja gazeta* sub la titolo „Ĉu la tria estos Esperanto?”.

Post la konferenca rezolucio sekvas la lasta dokumento – letero de Universitato *Justo* al la Ministrejo pri Klerigo kaj Scienco, kie ĝia rektoro, interalie, skribas: „Mi direktas al Vi la rezolucion de la konferenco por decido de la demando koresponde al nia skribpeto de la 20a de septembro 2006 N-ro 06/207 pri indo



enkonduki la lingvon Esperanto en studplanojn de klerigejoj de Rusia Federacio. La materialoj de la konferenco estos eldonitaj en ĝiaj laborlingvoj – la rusa kaj Esperanto – kaj distribuotaj minimume en 112 landoj.”

La formato de la libro estas 29 cm, la kovrilo estas mola, kolora kaj plastumita.

Serioza eldonaĵo, kiu espereble altiros atenton en rusiaj klerigaj rondoj kaj en la Esperanto-medio.

Boris KOLKER

Esperanto – la plej bona propedeŭtiko (laŭ la materialoj de Internacia konferenco la 13-an de aprilo 2007 en Moskvo). Redakcia kolegio: V. Samodaj, L. Tuĥvatullina, D. Ŝevĉenko. Eld. Eŭropa Jurscienca Universitato *Justo*, Moskvo, 2007. 149 paĝoj gluitaj. ISBN 978-5-7161-0179-1.

Nova Maigret-romano



Ĉi tiu estis la sesa romano en la Maigret-serio. Ĉiuj ses estis eldonitaj en 1930-1931! Ĝin sekvis sepdek pli, ĝis la lasta, aperinta en 1972. La belga verkisto Georges Simenon (1903-1989) estas unu el la plej sukcesaj, kaj vaste legataj, krimromanistoj de la dudeka jarcento. Apud li en tiu panteono egale rangaseble nur Arthur Conan Doyle kaj Agatha Christie. Ĉiu el ili verkis amason da rakontoj (romanoj kaj noveloj) pri la kariero de fikcia detektivo: la sendependaj detektivoj Sherlock Holmes de Arthur Conan Doyle, Hercule Poirot kaj Miss Marple de Agatha Christie, kaj inspektoro Maigret de Georges Simenon.

Jam antaŭ ĉi tiu libro aperis tradukoj de tri Maigret-romanoj en Esperanto: *Maigret hezitas* (originalo: 1968), *Maigret kaj la maljuna damo* (origina-

lo: 1949), kaj *Amiko el la infanaĝo de Maigret* (originalo: 1968), do ĉiuj tri el la malfrua periodo de la Maigret-serio. Kontraste, *La flava hundo* estis unu el la unuaj Maigret-romanoj, en la plej frua periodo de la serio. La diferenco inter tiuj tri kaj ĉi tiu estas tre palpebla. Sed ĉi tie ne estas loko por detale priskribi tion.

En *La flava hundo* inspektoro Maigret alvenas al la vilaĝo Concarneau, kiun antaŭe li neniam vizitis. Kun li estas inspektoro Leroy, nova kunlaboranto lia. Nelonge post ilia alveno pafita estas bone konata vilaĝano, s-ro Mostaguen, la ĉefa vinnegocisto de la vilaĝo. Mistere aperas ankaŭ flava hundo, kiun neniu en la vilaĝo rekonas. Tiu hundo rolas tra la tuta romano, kaj kelkrilate estas ŝlosilo por la krimagado, kiun devas solvi Maigret kaj Leroy.

Aliaj viktimoj sekvas, kaj iĝas verŝajne, ke ili estas iel kunligitaj, kvankam la kielo ne estas evidenta. Maigret pacience observas. Li konstante admonas sian kunhelpanton: ne deduktu; ne hipotezu; ne teoriumu; ne konkludu. Nur observu, ĉiam kaj ĉiel. Fine la solvo de la krimoj montros sin. Estu preta ĝin rimarki. Maigret ankaŭ ne emas diskuti la krimojn kun aliaj personoj. Li kolektas solidajn faktojn kaj informojn. Malsimile al Sherlock Holmes kaj Hercule Poirot, li ne utiligas specialajn fakajn sciojn proprajn. Kune kun li, ni, la legantoj, observas la eventojn, kaj kun Maigret ni gvatas la agojn de la vilaĝanoj, specife de la vilaĝanoj, kiuj iumaniere rilatas al la enketado, al la viktimoj, aŭ pri kiuj estas onidiroj.

Plurfoje en la romano Simenon ŝajnas miskonduki nin aŭ kredigi al ni, ke li miskondukas nin. Sed nepre ne kredu ĉion, kio aŭdiĝas aŭ kvazaŭ evidentas.

Lia aliro estas, tamen, malsimila al tiu de Agatha Christie, kiu ŝutis en siajn

romanojn amason de ŝajne neatentindaj faktoj aŭ spuroj, kiuj povus ebligi al la leganto, diveni la detalojn de la krimo kaj la krimulo, se la leganto, same kiel Poirot, konservus ilin en sia memoro, kaj per hipotezoj kunligus ilin. Maigret aspektas preskaŭ ne interesata de la detaloj, kiujn li vidas, aŭ kiujn oni raportas al li. La vilaĝanoj emas supozi lin pigra. Eĉ tre lerta leganto malfacile rimarkus la nemultajn spurojn, kiujn Simenon iom avare provizas en siaj diversaj ĉapitroj.

Maigret, simile al Hercule Poirot kaj Miss Marple, atendas ĝis la plej lastaj paĝoj de la romano, por prezenti al la ĉeestantoj (kaj tiel, al la leganto) plenan rakonton pri tio, kiel kaj kial ĉio okazis. Laŭ mia opinio, en ĉi tiu frua romano de Simenon, Maigret ne tre lerte kaj ne tre legantamike malkaŝas tiujn detalojn kaj solvon de la krim(ar)o. Multon li prezentas, kiun la leganto ne povus antaŭe scii; li utiligas ekster-Concarneau-ajn enketojn kaj informfontojn, pri kiuj ni ne scias antaŭ la lastaj paĝoj de la romano. Pro tio la romano iomete desaporis min. Sed nur tial. La zorga priskribado, donita de Simenon ĉie en la verko, tre allogas. Kaj la karaktero de Maigret iom post iom cerbumigas nin. Do kvankam mi preferas la pli malfruajn verkojn de Simenon, al mi plaĉis legi ĉi tiun. Kaj min tentas relegi ĝin.

Tradukis la verkon Daniel Luez, iama ĉefredaktoro de Fonto, kies esperanta stilo estas plaĉa kaj lerta. Li estas la tradukinto ankaŭ de la tri aliaj Maigret-romanoj eldonitaj en Esperanto.

Donald BROADRIBB

Georges Simenon: *La flava hundo*. El la franca tradukis Daniel Luez. Eldonis Sezonoj, Kaliningrado, 2007. 118 paĝoj kudritaj. ISBN ne indikita.

Prezo ĉe FEL: 12 eŭroj + aŭfranko.

Socipolitika satiro

Temas pri tre kurioza verketo el 1839. Unuarigarde oni povus supozi ĝin ekzameno de la zoroastrisma teologio. Duarigarde oni vidas, ke la zoroastrisma teologio ja aperas en la verko, sed tre neortodokse. Triarigarde oni trovas, ke temas pri politika satiro, kiu utiligas zoroastrismajn nomojn kaj pseŭdozoroastrismajn konceptojn por sia celo. Fine, kvararigarde, oni konsciiĝas, ke la traktato estas fantazia rakonto, por prezenti kelkajn tre trafajn verojn pri la politikismo kaj la praktika socia sistemo. Ĉio en kvazaŭdokumenta formo. Leginte, oni komencas pripensi, kiom la „satiro” el 1839 aplikeblas al la nuntempa realo, kaj la ŝoko rezultanta el tio dummomente stuporigas onian ĉiutagan koncepton pri la socia sistemo, sed nur dummomente, ĉar oni ankaŭ komencas pripensi, kion oni scias pri la aktuala mondo, kiu tre malsimilas al la oficiale instruata kredaro pri la aktuala mondo.

Serĉo per *Google* informis min pri neniun nesveda informo pri ĉi tiu libro, do ŝajnas, ke nur en Esperanto nesvedlingvuloj povas legi ĝin. Verdire, tio estas preskaŭ unika evento, ke krom en la originala lingvo nur en Esperanto verko troveblas. (Alia ekzemplo estas la tre grava dramo *Nemzo* de Alfred Nobel, verko simile ŝajne ignorata de la cetera mondo.) Tial mi ne povas kompari mian reagon al *Ormuzdo kaj Arimano* kun tiuj de aliaj komentistoj. Kaj kvankam mi ja iom profunde studis la historion kaj teologion de la zoroastra religio, tio ne multe helpas pri takso de ĉi tiu modernepoka libro. Do mi prezentos la tezojn de ĉi libro laŭ ilia apero en la teksto kaj ne provos debati pri la rilato inter la historie konata religio kaj la tekstoj en ĉi tiu verko. Efektive, tio estas, verŝajne, bona afero, ĉar Almqvist celis prezenti ne religian studon, sed socisatiron.

Jen, do, la prezentaĵo en ĉi tiu libro. En la komenco ekzistis du uloj, la

(laŭsupoze) personigo de Bono, nomita Ormuzdo, kiu loĝas sur la luno, kaj la (laŭsupoze) personigo de Malbono, nomita Arimano. Sed ĝuste kio estas „bono” kaj „malbono”? En la praktiko, se ni ignoras religiajn kaj filozofiajn instruojn kaj diskutojn, la „bono” estas tio, kion ordonas la regantoj. Kaj la „malbono” estas malobeo al tiuj reguloj.

Sed la universo estas grandega, kaj administri ĝin estas malfacilege. Eĉ por tute supernatura estulo tiu tasko estas tro neplenumbla. Necesas delegi departementojn kaj burokratiojn, por prizorgi la amasegon da detaloj, kiuj necesas por tiom giganta universo.

Ormuzdo publikigas tri „reglamentojn” por „solvi la bazan problemon de la Politiko”:

1. Reglamento de la landdistribuo. Listo de la nacioj/popoloj en la azia regiono, kun detaloj.

2. Vojiradreglamento. Por eviti interpuŝiĝojn de la urbanoj, ĉiu persono devas proponi kaj aprobigi precize, kiujn stratojn li/ŝi utiligos por sia ĉiutaga vivo. (Ormuzdo konfesas, ke tiun reglamenton la popoloj ne obeas.)

3. Proklamo pri regantinŝtalo. Ĉiu regist(ar)o estas instalita de Ormuzdo kaj rigore obeas la regulojn kaj leĝojn de Ormuzdo, eĉ kvankam ordinaraj homoj ofte ne rimarkas tion. Kiam okazas ŝanĝo de regist(ar)o, per kia ajn metodo kaj pro kia ajn kialo, ankaŭ tion kaŭzas Ormuzdo, kaj la homoj devas plenkore akcepti kaj obei, kion ajn ordonas tiu nova regist(ar)o.

En ĉiu lando, ĉiu politika sistemo ekzistas burokratoj kaj burokratioj spegulantaj tiujn en la regno de Ormuzdo mem.

Arimano, kontraste, havas neniun propran, specifan loĝlokon. Ofte li trairas la popolojn de la tero. Li opinias la reĝimon de Ormuzdo multe tro rigora kaj senplezuriga. Do konstante li sub-

fosas la „bonan” laboron de Ormuzdo.


Ĉion ĉi antaŭas aliaj diskutoj. Ekzemple, tre ridigaj pseŭdokleraj „etimologioj” de la vorto „sekretario”, okupantaj ok paĝojn de teksto, en kiuj provo derivi ĝin el etimoj signifantaj „ĉambrobalaistino”, „cigano”, „sako” ke. turnigas la kapon.

Vi bezonas tre fortan kapablon ŝerce kredi satiron, por ĝui, aŭ eĉ kompreni, la libron. Do mi avertas vin, ke ne temas pri facila legaĵo. Dirinte tion, mi bonvenigas kaj aplaŭdas la publikigon de ĉi tiu, alie perdita, verko.

La tradukisto mem kompostis la libron kaj eldonigis ĝin per *lulu.com*, ankaŭ tian entreprenemon mi salutas.

Donald Broadribb

Carl Jonas Love Almqvist: *Ormuzdo kaj Arimano*. El la sveda tradukis Gunnar Gällmo. Eldonis la aŭtoro per lulu.com. 58 paĝoj gluitaj. ISBN ne indikita.



ĈISM

2087: la triopo Ĉinio-Hindio-Brazilo superregas la planedon. La ĉina lingvo estas pene kaj suferi lernata de miliardoj da teranoj, tutsame kiel pli frue la angla-usona.

La eminenta ĉina lingvisto Zhang Ruixjang publikigas – apogate kaj subtenate de la Ĉina Humanista Kompatema Estraro – la eseon *Unua libro de ĈISM*. El la *Enkonduko*:

Antaŭ du jarcentoj iu eŭropano kreis „Esperanton”: neŭtralan lingvon, kiu, laŭ liaj esperoj, devus fariĝi tutmonda komunikilo. Tio ne

okazis. Li vivis en tiu sovaĝa praepoko, kiam Eŭropo kaj Nordameriko estris la mondon kvankam enhavantaj etan malplimulton de la homaro kaj etan eron de

la homa kulturo. Jen kial li havigis al „Esperanto” 95-procente eŭropajn elementojn (post jarcento la procento atingis 99,65). Tial la homoj konsideris ĝin superflua. Ili preferis la rektan lernadon de la barbara lingvo de la tiamaj tiranoj: la angla-usona, simila miaŭon. Ĝi fakte fariĝis praktike „internacia”, tiel produktante la fifaman „miaŭantan generacion”.

Pro la kolapso de la usona imperio, hodiaŭ tiu malklara malfacila missona lingvaĉo estas uzata nur de siaj kompatindaj denaskaj parolantoj. Hodiaŭ, fine, nia plej multenombra popolo kaj nia plej antikva kaj plej riĉa kulturo akiris sian justan mondlokon. Sekve nia belega, harmonia kaj facila lingvo estas la plej disvastigita en la planedo.

Nur la ideograma skribsistemo havigas etajn malfacilaĵojn al la ne-ĉinoj. Konfesinde: kvankam nekredible, kelkaj studentoj de nia lingvo plu lamentaĉas – probable pro nesufiĉa cerbokapablo – pri la „malfacileco” (!) de niaj ravaj ideogramoj ...

Tial, por ĉesigi tian ĝenan murmuron, nia Humanista Kompatema Estraro apogas la jenan proponon pri Ĉina Internacia Senideograma Mandarena (ĈISM). Ĝi anstataŭigas la ideogramojn per la ĉine normaligita „latina” alfabeto. Per tia malavara operacio nia Humanista Kompatema Estraro proponas al la homaro lingvon idealan pro ĝiaj facilegaj gramatiko kaj vortofarado – se ne paroli pri ĝia muzika valoro danke al la ravaj kvar tonoj, senkompara plezuro por ĉiu homa orelo. Ni certas, ke ĈISM estos entuziasme studata kaj korse kantata de la mondaj popolamasoj kaj de la lirikaj geartistoj.

Zhang Ruixjang

Sen Rodin



anoncetoj

Vizitu Iperity, la virtualan Esperanto-vilaĝon, kie pli ol 750 Esperanto-parolantoj kune babilas, montras siajn fotojn, pridiskutas mem faritajn filmojn, kunhavigas sian blogon ... Krozu al www.iperity.com/?lg=eo Tie vi trovos ankaŭ plurajn numerojn de MONATO senpage elŝuteblajn.

... **jarfine al IF!** Festu novjare kun ni la plej faman aranĝon por familioj kaj plenkreskuloj! Kun ampleksa prelega programo dumtage, kun tuttaga ekskurso, kun alloga vespera propono, kun silvestra bufedo kaj silvestra balo, kun apartaj programoj por infanoj kaj gejunuloj, kun la fama kaj ŝatata trinkejo "Knajpo". Petu informojn de IF, Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein. Tel./Fakso: +49 5624 8007. Interrete www.internacia-festivalo.de.

"Naturista Vivo", la ilustrita revuo por nudistoj/naturistoj/nudnaĝantoj. Belaj koloraj fotoj. Senpaga provekzemplero. La revuo aperas 4-foje jare, sur 16 paĝoj. Internacia Naturista Organizo Esperantista. Adreso: Jozsef Nemeth, HU-8531 Ihász, Fő u. 41/5. Rete: jozefo.nemeth@gmail.com.

Esperanto-instruistoj: vizitu www.edukado.net. Ĉio de vi por vi!

Kreu vian propran librokatalogon! Per la Retbutiko www.retbutiko.net vi povas krei librolistojn laŭ via propra deziro! Ĉu libroliston pri nur romanoj, aŭ pri poezio aŭ pri ĵus aperintaj verkoj? Aŭ ĉu vi preferas liston de difinita aŭtoro, ekzemple de la verkoj de Jorge Camacho aŭ de Sikosek? Eble vi volas nur scii, kiu estas la aŭtorino de La ŝtona urbo? Ĉio tio eblas en la Retbutiko en momento kiu plaĉas al vi, tage kaj nokte, senpage. Vizitu nin en www.retbutiko.net!

Prezo por anoncetoj (nur teksto, sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 1 eŭro* por unu linio. Sama anonceto kvin-foje sinsekve: triobla tarifo. Sama anonceto ankaŭ en la reta versio de MONATO: duobla tarifo. Minimuma faktursumo: 12 eŭroj*. Por pli grandaj anoncoj petu la tarifon de la eldonejo aŭ rigardu al http://www.esperanto.be/fel/mon/mon_anon.php.

*Por Eŭropa Unio: + 21 % AVI.

La ondo de esperanto

Ĉiumonata soci-kultura revuo en Esperanto



Abonebla kontraŭ

27 EUR

30 USD

aŭ egalvaloro

ĉe UEA, FEL, ELNA, UFE, EAB, SEF kaj dudeko da aliaj landaj perantoj

Fondita en 1909. Refondita en 1991. Eldonata en Rusio

- Tiel ni vivas: raportoj el la postkomunisma mondo
- Tra Esperantujo
- Niaj problemoj: revuoj, eseoj, intervjuoj, polemikaĵoj
- Lingvaj respondoj de Sergio Pokrovskij
- Historio kaj kulturo de Esperanto
- Recenzoj pri la novaĵoj de la libromarkato
- Mozaiko: krucvortoj, konkursoj, kvizoj, humuraĵoj
- Literatura suplemento semajnfine

SOCI-KULTURA REVUO EN ESPERANTO

Senkultura homo estas sklava besto (Cicero)

ISSN 0299-6587

LA GAZETO

**MONDKULTURA
SENDEPENDA
ESPERANTISMA**

PETU PROVNUMERON ĈE
LA GAZETO – 55210 CREUE (Francio)

La KancerKliniko

Politika Kultura Skandalema Ajnista
4 numeroj jare + La Krom

REGULAJ KUNLABORANTOJ: Serge Sire, Michel Duc Goninaz, Hu Guozhu, Ionel Onet, Mikaelo Bronŝtejn, Arnau, Laŭrenco Septier, Mao Zifu, Jopetro Danvy, Petro Braŭn, Gennadij Turkov, Fra Gaeta, Vilhelmo

Abono: 22 € (ekde 14 en kelkaj landoj)
Jacques le Puil, pĉk 12 729 73 X Paris
aŭ ĉe UEA, FEL, ELNA, ktp
lk@free.fr

Stefan Maul

El verva vivo ĵurnalista



Faktoj kaj spertoj el la vivo de la ĉefredaktoro de



En la historio de Esperanto ofte ĵurnalistoj ludis sufiĉe gravan rolon. Unu el ili estas Stefan Maul, kiu dum 45 jaroj aktivas, verkante kaj redaktante. Li precipe konatiĝis kiel fondinto kaj multjara ĉefredaktoro de MONATO.

Kiel kaj kial li fariĝis esperantisto kaj ĵurnalisto, kiu batalas kontraŭ maljustaĵoj ĉiuspecaj, tion vi ekscias per tiu ĉi informriĉa kaj parte kortuŝa libro. Akompanu liajn ofte neordinarajn vivon kaj karieron de milit-infano ĝis la 25-jara jubileo de MONATO.

Prezo: 20,00 EUR + aŭfranko

Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo:

Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio

Rete: www.retbutiko.net - retbutiko@fel.esperanto.be